

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

N-ro 1 * 5. Julio 1920

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

Prezo 1¹/₂ Resp.-Kup.

Persisti gis Triumfo!

LA SUKCESO DE E. T.

Atendu malfacilaĵojn, sed ilin ne timu!
(S. KREUTZBURG.)

Propradire ni devus paroli pri malsukceso; ĉar la centoj da samideanoj, kiuj jubilis, gratulis, kuraĝigis, promesis certe boni kaj abonigi aliajn, — ili silentas de post la ricevo de la specimena numero. Ĉu ili forgesis siajn promesojn? Ĉu ili volas prokrasti sian abonpagon ĝis nelimitita tempo? Ĉu ili havas malfidon en nia entrepreno? Nu, tiukaze ni pruvos al ili, ke ilia malfido estas senfunda, kaj ke la malmultaj, kiuj fideme sendis al ni tiuj sian abonmonon, estis tute pravaj farante tion.

Kompreneble estas neeble al ni, sub tiaj cirkonstancoj elirigi nian ĵurnalon tuj de la komenco ĉiusemajne aŭ eĉ pli ofte. Ni do aperigos en Julio kaj Septembro nur po du n-rojn, en Aŭgusto unu (prikongresan) numeron, ĝis la regula eliro de la ĵurnalo donos fidon al la s-anoj; ni rajtas supoz, ke ĝis venonta vintro la nombro de abonantoj tiel kreskos, ke de post Oktobro aŭ Novembro ni povos eldoni ET ĉiusemajne. Pro tio, ke la ĵurnalo eliras de la komenco malpli ofte ol ni supozis, ni nun kalkulos la abonon ne laŭ tempo, sed laŭ numeroj (vidu la novajn abon-kondiĉojn!).

La elir-oftecon de ET ni dependigas do tute de la pli-malpli granda nombro de la abonantoj. Nia projekto restos la sama; nia fincelo estas kaj estos ĉiutage aperado de la ĵurnalo. Sed nun ni jam ne provos, per unu ajakulo konkeri la mondon, kaj nur iom post iom finkonstruados nian entreprenon; tiamaniere ni atingos malpli rapide, sed des pli certe nian celon.

Bedaŭrinde, por plejeble baldaŭ ebligi pli oftan aperadon per malpliigo de la kostoj, ni devus ŝanĝi kelkajn preferaĵojn ĉe nia ĵurnalo:

1. La kvalito de la papero fariĝas malpli bona; la spec. n-ro estas presita sur briligita papero, kaj la nuna n-ro sur ordinara gazet-papero, kiu kostas nur la duonon de l' alia.

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimiro Korolenko.

Tradukis laŭ la 6-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro
Maria Ŝidlovskaĵa.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

I.

En mia hejmo, en Volin'a gubernio, kie la Karpataj flankaj montoj iom post iom malaltigis ĝis la marĉaj ebenaĵoj de Potesje), troviĝas malgranda urbetino, nomata Hlebno. De Nord-Ocidento ĝi estas ŝirmata de malgranda altaĵo. Al Sud-Oriento de la urbetino etendiĝas vasta ebenaĵo, tute kovrita de grenkampoj ĝis la ĉe l' horizonto bluantaj strioj de ankoraŭ ne ekstermitaj arbaroj. Tie kaj tie ĉi brilas, precipe sub la radioj de subiranta suno, larĝaj lagoj, kunigitaj de malgrandaj riveretoj, plene sekigantaj en somero.

Kvieto, paca, eĉ iomete dormanta regiono. La urbetino pli similas je vilaĝo ol je urbo, sed iam antaŭe ĝi estis atestado de tagoj, se ne pli bonaj, olmenaŭ malpli dormemaj. Sur la altaĵo estis nun ankoraŭ videblaj restaĵoj de remparoj, super kiuj nuntempe veno balancas la herbon, kies murmuron pasisto penadas esprimi per sia simpla fajlo, dum la komunuma brutaro pace sin paŝtas en la ombro de duone superŝutitaj foŝaĵoj.

Ne malproksime de la urbetino, super serpente kurbiganta rivero, staris — eble staris ankoraŭ nun — malgranda vilaĝo, nomata Loziŝci, pro kio ĉiuj ĝiaj loĝantoj, Loziŝcianoj, ricevis la familian nomon Loziŝkij. Sed por ilin diferencigi unujn de aliaj, estis aldonata al la familia nomo de ĉiu la alnomo: estis Loziŝkij kun alnomo de ia birdo aŭ besto, estis Loziŝkij Rado, Loziŝkij Ŝmirilo, eĉ Loziŝkij Tibilingo...

1) Vasta teritorio, kovrita de virga arbaro, "arbaro" - Ruse "les".

2. La kolonoj estas plilarĝigataj tiel ke anstataŭ kvar mallarĝaj (en la spec. n-ro) ni havas nun tri larĝajn kolonojn; tamen la formato de la ĵurnalo fariĝas eĉ iom pli granda ol tiu de la spec. n-ro. Per tiu ŝanĝo estas atingataj du avantaĝoj: la kostoj por la kompostado estas malpliigataj, kaj ni povas uzi la kompostojn por presi la pli gravajn artikolojn kaj literaturajn poste en libra formo. Per tio ni parte plenumas ankaŭ la dezirojn de tiuj, kiuj deziras la ĵurnalon en malgranda formato por povi bindigi kaj pli oportune konservi ĝin. Nun ili povos, se ili ne volas konservi la ĵurnalon pro ĝia granda formato, aĉeti la pli gravajn verkojn el la enhavo en libra formo.

3. Duona ĝis tuta paĝo en ĉiu numero estas rezervata por anoncoj. Ankaŭ per tio ni havas du avantaĝojn: ni ŝparas kompostokostojn, kaj la anoncoj el diversaj landoj multe impresas la ne-Esperantistajn publikon.
4. Ni rezignas provizore je la ilustraĵoj, el kiuj la plej malkaraj kostas ĉ. 50 Mk.

Supre nomitaj ŝanĝoj sekvigas, ke ni devas konsideri la ĉi-estantan n-ro-n kiel unuan, ne jam kiel duan n-ro-n. Tial ni devas represi la unuajn paĝojn de "La Senlingvulo" kaj la unuan parton de la artikolo pri IKUE. Laŭ instigo de unu abonanto kaj tial, ke ni volas poste aperigi la felietonon en libra formo, ni nun kompostas ĝin per same grandaj literoj kiel la plimulton de la cetera teksto.

Pro kelkaj demandoj kaj suspektoj (jam aŭdiĝas la kalumniuloj-subfosantoj) ni deziras deklari, ke la lingvo de nia ĵurnalo estas kaj restos la lingvo Esperanto fidela laŭ la fundamento de Zamenhof, ĉar Esperanto estas la sola internacia lingvo, kiu sukcesis eniri la praktikon; ĉiuj ĝisnunaj reformoj estas kaj supezeble restos nur teoriaj, kvankam kelkaj el ili estas sufiĉe praktikemaj.

Esperable tiu deklaro silentigos la kalumniulojn kaj suspektulojn unufoje por ĉiam. Se ĉiuj reformuloj estus tiel fidelaj, tiel konsciaj fundamentanoj kiel la eldonanto de ET, Esperanto ne bezonus tiam pro skismoj.

Kaj nun mi denove petas la ĉiulandajn samideanojn: Ekhavu fidon kaj abonu, tuj kaj sen hezito! Ju pli rapide la nombro de la abonantoj kreskos, des pli baldaŭ ET eliros regule ĉiusemajne aŭ pli ofte. Vi ja konsentis, ke Esperantujo bezonas tian ĵurnalon; pruvu, ke Esperantujo ankaŭ povas vivteni ĝin!

Malfacile estas difini la epokon, kiam ĉi tiu vilaĝo ekaperis tiel proksime de la urbetino. Eble tio okazis, kiam sur la remparoj vidiĝis ankoraŭ paflegilo, apud kiuj pafistoj ofte anstataŭis unuj la aliajn: jen Poloj en siaj multkoloraj kuntuŝoj¹⁾ staris kun brulligiloj en la manoj, dum Kozakoj kaj Rusaj vilaĝanoj, levante dense polvan nubegon, sieĝis la urbeton; jen, male, Kozakoj estis ŝargantaj siajn paflegilojn, dum Polaj trupoj atakis la remparojn. Laŭfame, la vilaĝanoj de Loziŝci estis iam ŝtataj Kozakoj, kaj ricevis tiam de Polaj reĝoj iujn privilegiojn; ŝajne, eĉ nobela rango estis al ili donacia pro iaj servoj.

Ĉio ĉi tamen jam delonge estis forgesita. En la sesdekaj jaroj de nia jarcento²⁾ mortis centjara maljunulo, Loziŝkij Ŝuljak. Dum siaj lastaj vivjaroj li kun neniu jam parolis, li nur voĉe preĝis aŭ legis sian malnovan Slav-lingvan biblion. Sed oni ankoraŭ ne forgesis liajn rakontojn pri la pasintaĵo, pri la Transdnjepro³⁾ Respubliko, pri la Hajdamakoj, pri tio, kiel li mem pli ol unu fojon estis migrinta trans Dnjepron kaj de tie kune kun Kozakaj bandoj estis atakinta Hlebno'n kaj Klevan'n; kiel la Hajdamakoj, trovinte rifuĝon en brulanta kampara dometo, pafadis el la fenestroj, ĝis kiam pro varmego iliaj okuloj krevis kaj iliaj pulvujoj eksplodis. La maljunulo briligis siajn sovaĝajn, estingigitajn okulojn kaj parolis: "Ho, he! Estis iam nia tempo! Liberecon ni havis!" Sed la Loziŝcianoj — jam de la tria kaj kvara generacio — aŭdante tiajn strangan rakontojn, sin signadis krucе, parolante: "Gardu nin Sinjoro nia Dio de tiaj aferoj!"

Ili mem jam de longa tempo forgesis ĉiujn siajn privilegiojn kaj loĝis apud la urbetino Hlebno parte kiel vilaĝanoj, parte kiel urbanoj. Ili parolis

1) Mezepoka kalfano de Polaj nobeluloj.

2) En la Rusa lingvo la rakonto estis presita en 1895.

3) Dnjepron - rivero en la Suda Ruslando.

KONDIĈOJ DE ABONO.

Oni povas aboni ET laŭ tri manieroj:

1. Oni pagu por 50 ekzempleroj de ET (egale ĉu de sama ĉu de diversaj numeroj) 60 stampitajn Internaciajn Respond-Kuponojn, aŭ por 12 ekz. 15 RK, aŭ por 1 ekz. 1¹/₂ RK.
2. Anstataŭ per RK oni povas ankaŭ pagi en ĉiuj landoj per Germanaj Markoj. Ni akceptas po 1 Gmk. anst. 1 RK. Do 50 ekz. de ET kostas 60 Gmk., 12 ekz 10 Gmk., 1 ekz. 1,50 Gmk.
3. Tria maniero estas la abonpago per la enlanda valuto de la diversaj landoj.

La precizan abonprezon por la unuopaj landoj montras sekvanta tabelo:

	50 ekz.	12 ekz.	1 ekz.
Por ĉiuj landoj	60 RK aŭ 60 Gmk.	15 RK aŭ 15 Gmk.	1 ¹ / ₂ RK aŭ 1,50 Gmk.
En naciaj valutoj:			
Anglujo	15/4 Ŝ.	5/4 Ŝ.	4 Penceoj
Belgujo	20 Fk.	5 Fk.	0,50 Fk.
Finnlando	30 Fmk.	7,50 Fmk.	0,75 Fmk.
Francujo	20 Fk.	5 Fk.	0,50 Fk.
Hispanujo	16 P.	4 P.	0,40 P.
Italujo	24 L.	6 L.	0,60 L.
Nederlando	8 Hfl.	2 Hfl.	0,20 Hfl.
Nordaj Landoj	12 Kr.	3 Kr.	0,30 Kr.
Portugalujo	6 Esk.	1,50 Esk.	0,15 Esk.
Svisujo	16 Fk.	4 Fk.	0,40 Fk.
Liseno	5,20 D.	0,80 D.	0,08 D.

Por Germanujo kaj por landoj kun same aŭ pli malbona valuto ni fiksas pli malaltajn prezojn, ĉar en la koncarnaj landoj mem la mono havas pli grandan aĉeto-kapablon ol en la plibonvalutaj landoj. Por tiuj landoj valoras jenaj prezoj:

	50 ekz.	12 ekz.	1 ekz.
Germanujo	40 Gmk.	10 Gmk.	1 Gmk.
Por landoj kun same aŭ pli malbona ol Germana valuto	48 RK aŭ 48 Gmk.	12 RK aŭ 12 Gmk.	1 RK aŭ 1,20 Gmk.
En naciaj valutoj:			
Aŭstrujo	120 Kr.	30 Kr.	3 Kr.
Bulgariujo	80 L.	20 L.	2 L.
Cehoslovakujo	60 Kr.	15 Kr.	1,50 Kr.
Estlando	60 E. Mk.	15 E. Mk.	1,50 E. Mk.
Hungariujo	120 Kr.	30 Kr.	3 Kr.
Jugoslaviujo	80 Kr.	20 Kr.	2 Kr.
Polujo	100 Pmk.	25 Pmk.	2,50 Pmk.
Rumanujo	60 L.	15 L.	1,50 L.

Ĉiu daŭra abonanto rajtas enpresigi malgrandajn anoncetojn senpage.

ne puran Ukrainan, sed Volinjan dialekton, kun almikso de Polaj kaj pure Rusaj vortoj. Ili konfesis iam la Grek-Unianan⁴⁾ religion; sed poste, post kelkaj malpacoj, ili estis aligitaj al la Grek-Ortodoksa paroĥo, kaj ilia malnova Uniana preĝejo estis ŝlosita kaj iom post iom disfalis en ruinojn. Ili kulturis kampojn, ili portis blankajn kaj grizajn kitelojn, blujajn aŭ ruĝajn zonojn, larĝajn pantalonojn, ŝafelajn ĉapojn. Kaj kvankam ili eble estis pli malriĉaj ol iliaj najbaroj, tamen malklara rememoro pri la pli bona pasinteco restis sub la pajlaj tegmentoj de iliaj dometoj. Iliaj vestoj estis pli puraj ol tiuj de najbaraj vilaĝanoj, ili preskaŭ ĉiuj povocis legi kaj skribi, kaj la famo iradis pri ili, ke ili sin tenas tro fiere.

Verdire, fremdulo ne facile ĉi tion rimarkis, ĉar, renkontante sinjoron aŭ ofiĉiston survoje, Loziŝciano same rapide deltras flanken, same profunde klinsalutas kaj iafaje eĉ humile kisas la sinjoran manon. Tamen ekzistis io, kaj homoj spertaj ion rimarkadis. Pri la Loziŝcianoj oni diradis, ke ili ion rememoras, ion imagas, pri io estas nekontenta.

Efektive, kiam najbaro, renkontante Loziŝcianojn, demandas lin: "Ĉu vi bone vivas?" aŭ: "Kiel Dio al vi helpas?" la Loziŝciano anstataŭ respondi: "Dankon al Dio!" nur svingas la manon kaj diras: "He, kia vivo ĝi estas!" aŭ: "Ni vivas kiel pizoj apudvojoj!" Kelkaj pli kuraĝaj el ili rakontis iafaje tion, kion ne ĉiu volonte aŭskultis...

Krome, ili de longa tempo havis proceson kontraŭ la najbara bienposedanto pro iu farma terpeco: komence la Loziŝcianoj malgajnis la proceson: sed poste okazis ial, ke la heredito de

4) Kiel rezultato de multaj provoj unuigi Grek-Ortodoksan kaj Katolikan religion estis fondita en Okcidenta Rusujo tiel nomata "UNIO", kiu kaŭzis ne malmulte da disputoj kaj malpacoj dum ĉirkaŭ du jarcentoj kaj fine estis nuligite en 1870.

Subtenantaj abonantoj krompagas po duona jaro sumon, kiu minimume egalvaloras la prezon por 12 ekz. de ET, ili rajtas anonci **grandajn anoncojn senpage** (laŭ la disponebla spaco). Ni intencas, disponigi en ĉiu numero duonan ĝis tutan paĝon por anoncoj.

La administracio de ET estas preta, malfermi konton al la abonantoj. Do oni ne bezonas sendi por la abono precize kalkulitajn sumon (ekz. 8 Hfl., 13/4 Sil., 3,20 Dolaroj ktp.), sed oni povas sendi rondan sumon (ekz. 10 Hfl., 20 Sil., 10 Dolaroj ktp.). Tiukaze ni liveros al la sendintoj fion da numeroj de ET, ĝis la randa sumo estos konsumita; ekz. por 10 Hfl. ni liveros 63 ekz., por 20 Sil. 75 ekz., por 10 Dolaroj 157 ekz. La ricevon de ĉia sumo ni kvitancoj en ET.

ĈIAJ ABONEJOJ.

- AŬSTRIO. Karl Bartel, Graz, Schönaugasse 6. Postsparkassen-Konto 186470.
- ĈEĤOSLOVAKIJO. Otto Šklenko, Hradec Kralove, GERMANIJO. Postcheck-Konto Köln 70865, Teo Jung, Horrem Bez. Köln.
- HUNGARIJO. P. Balkanyi, Budapest V, Hajos-utca 15, II. POLIJO. Ad. Oberrotman, Warszawa, Krak. Przem. 10.
- PORTUGALIJO. Silva & Carreira Lda., Lisboa, Rua da Assunção 42, 5.

ĈIAJ ABONANTOJ.

Por eviti ampleksan korespondadon, kiu forrabas tempon kaj monon, ni publikigos ĉi-sube la nomojn de tiuj abonantoj, de kiuj ni efektive ricevis la abonmonon (ĝis 30. Junio). La nomojn de la abonantoj, kiuj jam pagis, sed de kiuj ni ne jam ricevis la abonmonon, estas publikigotaj en la sekvonta numero.

La ciferoj post la nomoj signifas, ĝis kiu n-ro la abono valoras. La litero (S) post la nomoj signifas, ke la koncernaj abonantoj estas subtenantaj abonantoj kaj rajtas anonci senpage grandajn anoncojn.

- Liverpool, James Baxter, pagis 2foje ĝis n-ro 26. — Godesberg, Max Butin, ĝis n-ro 12. Th. Oster, Friedr. Jahn, Hanni Schmidt 8. — Montreal, Tom Allart 5. — Sheffield, Rich. Harward (Subtenanto) 24. — Purley, F. A. Goodfield 16. — Essen, F. Pillath 12. — Zürich, F. Hirzel (Subt.) 30. Kiel. P. Tarnow (S) 11. — Siegburg, Haefeker 11. — Köln, A. Junker (S) 11. — Berlin, W. von St. Paul-Illeire 11. — Breslau, Bratschke (S) 11. — Hirschfelde, Pfennigwerth (S) 11. — Hengelo, G. v. Heek (S) 30. — Koblenz, Funken 11. Elberfeld, Thiele 11. — Potenza, Cesarini 11. — Reichenau, Schilling 11. — St. Gallen, Esperanto-Gesellschaft 40. — Chemnitz, Klemm 11. — Braunsberg, Kraft 11. — Regensburg, Nüßlein kaj Altmöder po 11. — Koiserswerth, Poensgen 11. — Krefeld, Rother (S) 11. — Turku, Kaukopaasi 24. München, Buked 5. — Plauen, Kurt Zschecho 11. — Dublin, Meagher (S) 24. — Breslau, Georg Habelok kaj Promnitz-Lesehalle po 11. — Rovereto, Mondini 24. — Berlin, S. Woboda kaj Bochenek po 11. — Meda, Moutinho 2foje n-ro 1. Greifswald, Rieck 11. — Nürnberg, Muscat 11. — Wilhelmshaven, Eden, Lorenz, Stark, Merdache po 11. — Ristritzingen, Laib 11. — Vaasa, Heilmann (S) 24. — Kovno, P. v. Medem 10foje ĝis n-ro 12. — Elberfeld, Trarbach 11. — Dresden, Hankel 11. — Rotterdam, Poolen, Hulsmann, van Boven, Hendriks, Reyde, Lindsen, Korbinj, Verschoof, Laan, Klaassen, Snook 1. — Luusikaupunki, Partanen 24. — Győr, Kardos, Weisz, Milosovits (S), Rossner (S), Stelner (S) po 10. — Plauen, Röder, Otto, Lauterbach, Adolf, Wünsche, Rödel, Heinrich po 11. — Auerbach, Müller 11. — Breslau, Thielking kaj Thiel po 11. — Berlin, Schwaiger 2foje 11. Gube 11. Schwarz (S) 25foje 1. 1foje 15. — Turku, Tauno Hakanen kaj Ilmari Ekström (S) po 24. — Berlin, Geschw. Israel 11. — Reutlingen, Welzel (S) 12. — Bethel, Golttermann 11. — Breslau, Gleis, Geissler, Burda 11. — Berlin, v. Medvey, Elise Vater 11. — Warnemünde, Schuel (S) 12. — Oschersleben, Pöhl 11. — Salzburg, Schmidt 10.

la bienposedanto cedis. Laŭfame, la Loziŝĉanoj post tio iĝis ankoraŭ pli fieraj, kvankam ne pli kontentaj.

Sed nenie en la mondo oni tiel gastame akceptis ĉiujn prertovojanojn, kiuj povis rakonti ion pri la vasta Dia mondo.

II.

En Loziŝĉi estis iu Osip Loziŝki, kiu vivis tute same kiel ĉiuj aliaj, t. e., verdire, ne tre agrebla. La terpeco estis malgranda, la farmkondiĉo malprofitaj, la mastrumoj pli kaj pli malfortigis. Li havis edzinon, sed ankoraŭ ne havis infanojn, kaj pli ol unu fojon venis al li la penso, ke, kiam li havos infanojn, ili vivos ne pli bone ol li, se ne pli malbone. Dum viro estas juna — li pensis —, dum ne nepas idoj post lia dorso, li devas provi elserĉi, kie sin kaŝas lia sorto.

Li ne estis la unua nek la lasta el tiuj, kiuj, adiaŭinte siajn parencojn kaj infanojn, ekiris, por serĉi sian sorton, por labori, batali kontraŭ granda mizero ĉe fremduloj, manĝi fremdan maldolĉan panon. Ne malmulte da tiaj malkontentuloj forlasis ankau Loziŝĉon, forvojaĝante unuope, duope, eĉ are. Sed ĉiujfoje la entrepreni havis malbonan finon. Iuj revenis malsataj kaj ĉifonvestitaj; iuj Germanoj aĝrestis ĉe la landlimo kaj forpelis el sia regno; iuj perdiĝis, neniu scias kie, pereis en la vasta Dia mondo kiel malgranda pinglo en amasego da paĝo.

Osip Loziŝki ŝajne estis la unua, kiu ne pereis, sed donis pri si sciigojn. Ne tia homo li, certe, estis, kiu pereas, sed kiu eĉ aliajn povas elirigi.

Post unu aŭ du jaroj alvenis en Loziŝĉon leteru kun granda flavruĝa poŝtmarko, neniam vidita en la lando. Legante kaj relegante la leteron, ne malmulte miris pri ĝi la skribisto kaj la instruisto, la pastro kaj kelkaj pli altrangaj personoj, kiujn la afero interesis; fine tamen oni

Ni petegas ĉiujn abonemulojn, kiuj promesis aboni (estas kelkaj centoj, precipe multaj Britaj S-anoj), ke ili tuj kaj senhezite sendu sian abonpagon, por ke ni povu kun ioma certeco pri kalkuli la supozeblan daŭran nombron de la abonantoj kaj laŭ tio aranĝi nian aferon.

La nuna numero estas sendata al ĉiu mendinto de la specimena numero. La sekvontan n-ro (fino de Julio) ricevos nur la certaj abonantoj, kiuj pagis aŭ pagos. La specimena n-ro, presita sur bona papero, 8-paĝa, kun riĉa enhavo kaj multaj ilustraĵoj, estas ankoraŭ havebla sampreze kiel ordinara n-ro.

UEA.

Tri simplaj literoj formantaj strangan kunmetaĵon! Ne konataj de la granda plimulto de l' homaro, ili estas je fajraj signoj engravuritaj en la koro de ĉiu vera Esperantisto. Bedaŭrinde ne en la koro de ĉiu Esperantisto. Multaj samideanoj ankoraŭ ne estas membroj de nia plej grava, plej praktika, plej sukcesplena organizao, ili iras sian propran vojon; kelkaj eĉ provis fondi konkurantajn ligojn aŭ klubojn, kiuj tamen neniam povas atingi la gravecon de UEA kaj cetero nur disdistingas la fortojn.

Kiel eble plej forta UEA estas ankau kiel eble plej forta antaŭenpuŝilo por Esperanto, plej taŭga konvinkilo por la indiferenta mondo. Tial devas ĉiuj, kiuj celas baldaŭn triumfon de Esperanto, nepre koncentriĝi en la „Universala Esperanto-Asocio“ kaj eviti la malkoncentriĝon en plurajn sensignifajn ligojn kaj klubojn.

En ĉiu numero de „Esperanto“ ni legas: UEA bezonas 5000 membrojn! Tiu postulo estas preskaŭ tro modesta. Ne kvin, sed kvindek mil membrojn ĝi bezonas! Nur tiam ĝi povos vere konvinki impresi la mondon, nur tiam ĝi povos libere labori kaj ne plu estos dependa je la bonvolo kaj subteno de kelkaj malavaraĵaj idealistoj.

Tamen — hodiaŭ eĉ ne kvin mil Esperantistoj estas anoj de UEA. Bedaŭrinde, hontiga fakto! En unu festo, en unu ekskurso, en unu amuza vespero, por iu kaprico vi elpezas 20 Fk., 50 Mk., 100 Kr. por materialaj ĝuoj; ĉu en la tuta jaro vi ne povas oferi 5 Fk., 12 Mk. aŭ 50 Kr. por idealaj kaj tamen praktikaj aferoj, por pagi vian kotizaĵon al UEA?

La nombro kaj la mono, ambaŭ faktoroj estas necesaj por evoluigi la asocion laŭdezire. La nombro — por povi plejeble praktike uzi Esperanton helpe de la asocio kaj tiamaniere konvinki la publikon pri la utileco kaj necesece de internacia lingvo; la mono — por ebligi al la asocio daŭran bonan funkciadon. Ambaŭ faktorojn vi povas estigi aligante al UEA.

Pripensu, ke multaj pluvogutoj povas superflugi eĉ malgrandan rivereton tiel ke ĝi torente tuigas kaj ĉion forŝiras, kio baras ĝian vojon. Tia torento devas fariĝi nia UEA. Ĝi devas tondre scigli al la mondo, ke Esperanto „vivas, taŭgas kaj progresas“. Ĝi devas triumfe inundi ĉiujn terpartojn, ĉiujn landojn venkante, detruante, forŝirante skeptikecon, antaŭjuĝojn kaj indiferentecon, kiuj baras al ĝi, al Esperanto, al ĉiuj samideanoj la vojon al la celo. Tiam la verko de nia fervorega samideano Hodler estos kronata kune kun la verko de nia majstro Zamenhof, kaj la spirito de tiuj du nobl-animaj homoj ekregos la mondon.

venigis S-inon Lozinska kaj donis al ŝi la leteron en tute disŝirita koverto, sur kiu tute legeble staris ŝia nomo kaj adreso.

La letero estis de ŝia edzo el Ameriko, al gubernio Minnesota; sed el kiu distrikto kaj el kiu vilaĝo, ne estas eble nun diri, ĉar... Cetero, baldaŭ ni ĉion ekscios...

En la letero S-ro Lozinski skribis, ke — dank' al Dio — li fartas bone, laboras en farmbieno kaj ke — se Dio estos helpanta al li same, kiel li helpis ĝis nun — li esperas baldaŭ mem fariĝi terposedanto. Cetero, li kiel laboristo havas tie pli bonajn kondiĉojn ol iu mastro en Loziŝĉi. Granda libereco regas en tiu lando. La tero ne mankas, bovinoj donas po unu plena sileto da lakto, ĉevaloj estas veraj virbovoj. Viron kun bona kapo kaj bonaj brakoj oni ŝatas kaj respektas, kaj antaŭ nelonge eĉ lin, Osipon Lozinski, oni demandis, kiun li deziras elekti ĉefprezidanto de la tuta regno. Kaj li voĉdonis ne malpli bone ol aliaj kaj, kvankam ne estis elektita tiu, kiun deziris li kaj lia mastro, tamen al li plaĉis, ke, kiel ajn estas, li ankau estis demandita. Unuvorte, regas tie libereco, kaj bonega estas ĉio cetera. Tamen Lozinski ekubulis sen la edzino, tial li penadis labori kiel eble plej multe, kaj la unuan monon li elpezis por la „fiketo“, kiun li sendas por ŝi en ĉi tiu letero. La „fiketo“ ja estas ĉi tiu blua paperfolio, kiun ŝi devas gardi kiel sian propran pupilon. Sur ĝi estas desegnita vaporŝipo kaj vagonaro kun lokomotivo. Tio signifas, ke kan ĉi tiu bileto oni senpage veturigos S-inon Lozinska per vagonaro kaj per ŝipo — antaŭe ŝi devas nur atingi la Germanan urbejon Hamburg. Por ĉiuj ceteraj elspezoj ŝi vendu la bovinon, la dometon kaj la tutan havaĵon.

Dum la virino legis la leteron, la homoj ŝin rigardis kaj interparoladis pri tio, kia granda forto povas esti entenata en tia senŝignifa paperfolio, ke oni veturigos ĉi tiu al la fino-limo de l' mondo, nenie demandante de li pagon. (Datrigota.)

IES.
(Internacia Esperanto-Servo).

Responde al nia propono en la specimena n-ro de ET ni ricevis konsentantajn leterojn el Litovujo, Kanado kaj Usono. La praktikaj Usonanoj eĉ tuj sendis fian interesan leteron, kiun ni ĉi-sube publikigas. Espereble ankau en aliaj landoj trovigis baldaŭ helpemaj samideanoj, kiuj ekhapias la ideon, por ke ni povu plene aranĝi la certe tre gravan IES. Ni petas niajn legantojn ĉiulandajn traduki sekvantan leteron kaj publikigi ĝin en la nacia gazetar.

NIA MONATA LETERO EL LISONO.

Antaŭ du monatoj nova movado iris trans Usonon kiel granda ondo, precipe en la orienta parto. Estis movado por porti laboristajn laborsurtutojn kiel protesto kontraŭ la alta kosto de vestaĵoj ĉiuspecaj. En kelkaj urboj riĉuloj kaj malriĉuloj ilin portis ĉie. La tuta rezulto estis la altiĝo duobla kaj triobla de la laborsurtutoj kaj krio de la laboristoj, kiuj devis porti ilin ĉe sia laboro, ke oni haltigu la movadon. La posttempa rezulto estis la publikigado de artikoloj pri la grandaj profitoj gajnitaj de la vestaĵo-vendistoj kaj koncentriĝo de la publika opinio je tiuj ĉi prezoj.

La sekvo estis, ke multaj ne plu aĉetis: kelkaj ne volis, aliaj ne povis. Preskaŭ ĉiuj butikoj jam ne plialtigis siajn prezojn, dum aliaj ilin iom malaltigis. Akcelis tiun ĉi movadon la bankoj, ĉar — instigitaj de la Federala Banko* — ili ne plu pruntedonis monon al butikoj kaj korporacioj kontraŭ aĉetita ŝtofo kaj manĝaĵo, por ke ili ne povu ĝin teni por kaj ĝis pli altaj prezoj. La vera manko de aĉetpovo de la publiko ankau helpis. Tial la magazenoj kaj butikoj malaltigis siajn prezojn ĝis 20—50% kaj kelkokaze ĝis 75%, por ke ili povu akiri la monon ne plu pruntedonitan de la bankoj. Ili bezonas la monon por financi la aĉetajn du aŭtuno, kiam ili kutime replenigas siajn bretojn.

Alia helpaĵo estas la alta valuto de la Dolaro kaj la egi rezultanta nuligo de la mendoj de multaj Eŭropaj firmoj.

La plimulto de la Usonanoj nun profitas de la malaltigitaj prezoj, opinante sendube, ke de nun la prezoj estos malpli altaj; kaj eble ili estos. Tamen la prezoj ne povas daŭri malpli altaj, se oni ne fabrikas pli ol antaŭe; ĉar estas la manko de aĵoj, kiu kaŭzas la altajn prezojn en Usono same kiel en la tuta mondo.

Spite la fakto, ke Usono estas tre riĉa je materialoj kaj mono, ekzistas nun terura manko de havebla kapitalo por necesaj kaj novaj industrioj. Oron kaj papermonon ni havas multe pli ol iam antaŭe. La papermono de la Federala Banko estas bazita ĉ. 42% sur oro, la cetera sur materialo, manĝaĵo ktp., alivorte sur komercaj pagpromesoj. Estas por tiu ĉi kaŭzo, ke ili ne plu konsentas la pruntedonon de mono al necesaj industrioj.

Pro la manko de mono la fervojoj kaj industrioj devas pagi 7—8% por sia prunteprenita kapitalo, kio estas duoble pli ol antaŭe. Pro la

* Ĉe firmoj, nomoj, popolmonoj, specialaj okazaĵoj ktp. oni bonvolu estonte ĉiam aldoni la nacilingvan vorton en krampoj por certigi precizan tradukon en aliajn lingvojn. LA RED.

ENIGMOJ.

Manuskripto de enigmoj oni bonvolu sendi al S-ro Max Butin, Kronprinzenstr. 33, Bad Godesberg, Germ.

SILAB-ENIGMO.

a, ani, ce, da, din, e, fon, ga, go, gro, ing, is, la, mo, mi, ne, no, no, no, no, no, no, no, no, no, o, pe, ra, re, sa, ta, ta, ta, te, ti, ti, to, u, ver.

- 1- a estas en parkoj,
- 2- a entenas multege da akvo,
- 3- a vivas en akvo kaj sur tero,
- 4- a estas ano de mila giganta gento,
- 5- a estas malbona eco,
- 6- a vivas en Afriko,
- 7- a estas eminenta Esperantisto,
- 8- a loĝas en Infero,
- 9- a estas parto de veturilo,
- 10- a estis urbo de Universala E-Kongreso,
- 11- a vestas sinjorojn,
- 12- a renversas arbojn.

La komencaj literoj de la vortoj, legataj de supre al malsupre, nomos vortojn el Zamenhofa poemo.

SERC-DEMANDOJ.

- a) Kiu estas la plej inda koloro?
- b) Kiu koloro estas la plej pura?
- c) Kiu signo iĝas kolosala per diminutivo?

(Ch. G. Stuart-Menteth.)

El frukto forprenu peceton, kaj vi ricevos muzikilon. (Leono Funken.)

[SOLVO] publikigotaj en sekvonta numero.]

SOLVOJ el la spec. n-ro.

- 1. La verda stelo. (klapo, praAva, salVo, penEtri, Roistro, korDo, Amelo, paSto, Taru, liiEro, gLasu, Onikso.)
- 2. artiŝoko, asparago, beto, bulbo, fabo, karoto, napo, okzalo, pizo, rafano, rapo, spinaco.
- 3. rabo, ribo, robo, rubo.
- 4. tubero, tubu.

samaj kaŭzoj la plimulto de la akcioj ĉe la borsoj malaltigis kune kun la pagpromesoj de korporacioj kaj la diversaj urb-, ŝtatal- kaj federalaj pagpromesoj. Eĉceptoj estas la sukeraj kaj oleaj korporacioj, kies akcioj, precipe tiuj de la sukeraj kompanioj, tre altiĝis.

Preskaŭ tuj post la komenco de la mondmilito la salajroj de laboristoj, meĥanistoj kaj industriistoj pli kaj pli altiĝis kaj samtempe la laborhorj malpliĝis ĝis 7 kaj 8 horoj kun pli altaj salajroj por tiuj, kiuj laboris pli longe ol ok horojn aŭ laboris dimanĉe aŭ libertage.

Tio sekvigis, ke multaj homoj forlasis la kamparon kaj venis urbon. La plimulto de la bienlaboristoj, kiuj iris al la milito, ne reiris al la kamparo post la militservo, sendube pro la altaj salajroj ricevataj en la urboj, ankaŭ ĉar ili trovis la vivon en la urboj pli interesa kaj ŝajne pli profitplena. Sed nun la bienposedantoj suferas, ĉar mankas la necesaj laboristoj. Miloj da hektaroj restas senproduktaj, ĉar la bienposedantoj ne semas pli ol ili povas rikolti per siaj familioj kaj dungitoj. Kaj ĉio ĉi okazas, dum la tuta mondo petas pli da manĝaĵo!

Estas la opinio de bankistoj, ke la prezoj de manĝaĵoj terure altiĝos. Tiel ili ne estas sufiĉe altaj nun!!

Nu, mi ne estas antaŭdiristo aŭ filo de antaŭdiristo; sed oni ne necesas esti tia por kompreni, ke — se la manĝaĵoprezoj altiĝos dum la vintro — la urbanoj grumblos petante pli da mono kaj — se ili ĝin ne ricevos — ili teruros per strikoj ktp. Kaj kiuj devenis de la kamparo, tiuj sendube grumblos pli laŭte forgesante, ke oni ne povas aĉeti tion, kio ne ekzistas; forgesante, ke mono ne estas riĉaĵo; forgesante, ke riĉaĵo estas tio, kion ni gajnas, produktas kaj fabrikas de la tero; kaj neŝciante, ke ili similas al hundoj ĉasanta sian propran voston; kaj nekomprenante, ke — se ni ĉiuj estus milionuloj — morgaŭ ni ne povus aĉeti pli ol oni rikoltas aŭ fabrikas. La mondo rikoltas tion, kion ĝi semas, kaj ne pli. A. S. VINZENT.

Adresoj

de gravaj firmoj, al kiuj fojroj k. a. povas sendi siajn Esp. reklamilojn, cirkulerojn ktp.

Ni dankas S-ron G. van Heek, Del. de UEA, Hengelo (Nederlando), pro la elsendo de la adresoj kaj petas la delegitojn en aliaj lokoj fari la saman indikante adresojn de firmoj en sia regiono. — Uzontoj de la adresoj estas petataj menci al la firmoj en unu el la modernaj lingvoj, ke la regiona delegito de UEA estos plene preta traduki la reklamilon, cirkuleron ktp.; ankaŭ ili detale laŭ urbojn, kie Esperanto jam estas uzata dum la fojro ktp. — Aliaj E-gazetoj estas petataj enpresi la liston, por ke la adresoj fariĝu kiel eble plej konataj.

Firma van Heek & Co., Markt 24, Enschede.
G. J. van Heek & Zn., Fabr. Rigtersbleek Lonneker.
Gebr. van Heek, Hengeloschestr. 125-127, Enschede.
Firma Gerh. Iannink & Zn., Langestr. 41, Enschede.
ter Kuile & Co., Walstraat 32, Enschede.
Nico ter Kuile & Zonen, Lage Bothoofstraat 5, Enschede.

N. J. Menko, Zuiderhagen 95, Enschede.
G. Dijkers & Co., Haaksbergerstraat, Hengelo.
J. L. Th. Groneman, Spoorstraat, Hengelo.
F. Hazemeyer & Co., Haaksbergerdyk, Hengelo.
Heemaf, Bornscheersraat 5, Hengelo.
Gebr. Stork & Co., Kon. Hofgoederenfabriek, Hengelo.

D. W. de Monchy, Grundelweg, Hengelo.
S. J. Spanjaard Dr., Deldenscheweg, Borne.

La Urbo de la Homaro.

Novelo de FREDERIKO KARINTHY.

Mi jam ne memoras kie, mi nur rememoras la ĝojegon kun kiu mi legis, ke en Ameriko estas farita grandioza kaj belega plano. Oni volas konstrui la „Urbon de la Homaro“, grandegan luksan „Kosmopolison“ el marmoro kaj naturŝtonoj, en kies centro trident-metra turo anoncus la ideon de la Homa Progreso. En ĉi tiu urbo havos sian bulvardon ĉiu scienco kaj arto; en ĉi tiu urbo ne estos lueblaj loĝpalacoj, fabrikoj, polican-kazernoj, nur muzeoj, universitatoj kaj monumentoj. La konstruanta ambicio donos la belecon al la domoj; ĉiu ŝtono sur la stratoj, ĉiu briko de la konstruaĵoj estos farataj per artistaj manoj. La urbo apartenos al neniu kaj al ĉiu; ĉio, kio estas valoro kaj beleco en la homa spirita progreso, estos en ĝi.

Tiu ĉi belega plano vere entuziasmigis min. Mi ĝojegis kaj skribis tiuj leteroj al mia amiko, al la Rekonstruita Homo, kiu ofte sendis al mi novaĵojn el la Estonto, kaj mi petis lin, ke li bonvolu anonci al mi, ĉu la Urbo de la Homaro efektiviĝos kaj ĉu miaj nepoj povus ricevi tie eĉon kaj ŝtatanrajton?

Por respondi mian demandon, la Rekonstruita Homo sendis al mi du ĵurnalojn el la Estonto: la unuan el 1962, la duan el 1985.

Ĉiuj du skribas entuziasme pri la Urbo de la Homaro, kiel sekvas ĉi-sube:

20. Novembro 1962.

... Per grandegaj festoj hodiaŭ — fine — la Kosmopoliso, la Urbo de la Homaro, estas malfermita. Tridek-du standardoj ornamis la Turon de la Progreso, — mondofamaj verkoj de tridek-du pentristoj. Kiam la vitro-sonorilo eksonigis, kaj malfermiĝis la pordego de la urbo, la festema publiko pleniĝis la stratojn kaj entuziasmiĝe admiris la belegaĵojn de la Bulvardo: la Galerion de la Belaj Artoj, la Universitaton de la Sciencoj, la Akademion de la Provoj, la Turon de la Progreso kaj ĉion. Sur la stratoj

Bendien Zonen, Groote straat 29, Almelo.
H. ten Cate Hzn. & Co., Spoorstraat 1, Almelo.
Kon. Oldenzaalsche Stoomweverij, Oldenzaal.
Richard v. Wulfen Palthe, Villa „de Klieverik“ Oldenzaal.

H. J. Gelderman & Zonen, Oldenzaal.
M. G. v. Heel, Fabrikant, Ryssen.
Firma ter Horst & Co., Jutefabriek, Ryssen.

Fervojistoj tutmondaj!

Estas urĝa tempo, ke ni revivigu la Internacian Asocion de Fervojistoj-Esperantistoj! Sed antaŭ ol tion fari, estas nepre necese, ke la landaj asocioj estu restarigitaj. Por Germanujo la subskribinto jam komencis tion fari (vidu „Germana E-isto“ n-ron 5-4). Niaj ĉefaj taskoj devas esti:

1. la starigo de faka vortaro,
2. la enkonduko de Esperanto kiel ofica korespondilo de la fervojaj administracioj.

Niaj ĉefaj samcelanoj faris la komencon, forsendinte en januaro cirkuleron al ĉiuj mez-Eŭropaj fervojaj administracioj kaj petante, ke oni en jaro 1920 reciproke — almenaŭ prove — korespondu en E. La sukceso, laŭ mia opinio, ne estos tre ĝojiga, ĉar „unu kolombo ne alportas la someron“; ĉiuj landaj fervojaj asocioj Esperantistaj devas fari la saman paŝon samtempe.

Sed la landaj asocioj devas esti sufiĉe multnombraj. Ni povas nur tiam ion atingi, kiam ni povas atesi laŭnombre, ke ankaŭ jam sufiĉe da fervojistoj scipovas E.

Fine ni devas posedi fakan vortaron enhavantan ĉiujn oficajn esprimojn.

Do, fervojistaj s-anoj, revivigu tiuj vian landan asocion, por ke ni baldaŭ povu denove nin kunigi en la internacia asocio!

Por povi tre efike propagandi en Germanujo, mi intencas, aranĝi propagandan poŝtkart-ekspozicion migrantan, kiu devas enhavi tutmondajn stacidomojn kaj fervojajn konstruaĵojn. Helpu al mi, karaj samfakanoj, mi petas, kaj sendu al mi vidaj-poŝtkarton de via stacidomo aŭ de alia fervoja konstruaĵo! Al ĉiu mi resendos poŝtkarton ilustritan de mia urbo.

La E-gazetoj estas petataj represi ĉi tiun al-vokon.

Georg Habelok
Breslau 10 (Ger.)
Schleiermacherstr. 19.

Esperanto Triumfonta valoras nenion,

se ĝi ne eliros almenaŭ ĉiusemajne. Nur tiam ja estos utile, ke ET publikigu la tutmondajn aktualaĵojn kaj la raportojn de l' Esp-istaj asocioj, ligoj kaj grupoj. Tial ne prokrastu vian abonon! Abonu seĝezite, por ke tuj de la komenco de l' venonta aŭtuna-vintra sezono ET eliru semajne! Precipe por la okcidentaj landoj la abonado al ET estas tre malkara pro la alta stato de ilia valuto. Do ne hezitu kaj

abonu tuj!

memvole universitataj studentoj gardis la ordon; ĉiencijaj profesoroj kaj fakuloj gvidis la mirantojn. Nur unu malgranda incendio interrompis la feston: la ambasadoro de la malgrava Eŭropa ŝtato ekokoleris (tiel diris multaj), ĉar de la pordego la portistoj prenis la karton pli antaŭe de la Kaŭkaza princo ol de li, — li ne atendis la festenan aranĝantan en la Palaco de la Konkordo ...

El la alia artikolo nur malgrandan parton:

4. Aŭgusto 1985.

... La gloriplena kaj grandioza milito alvenis al sia fino: niaj glorie armeoj venkis hodiaŭ la malamikan armeon. En ĉiu patriota koro ekflamiĝos hodiaŭ la flamo de la ĝojo: niaj potencoj, pri morto ne pensantaj soldatoj denove lavis nian standardon en sango kaj larmo; sed ili purlavis ĝin, Ni festenu, la nacio havas grandan feston!

Generalo Intrepide hodiaŭ je la 6-a horo vespere tute ruinigis la koncentritajn trupojn de Inksome, kaj per tio la fronto de la malamiko nenigis. Ni scias, ke la malamiko laŭde enmarŝis Kosmopolison kaj prenis defendo-pozicion. Tio estis fakte ferebla, ĉar la Urbo de la Homaro ne havas soldaton. Post dudekajnaĵo preparo nia glora generalo Intrepide hodiaŭ — fine — komencis la sieĝon de la urbo, por ke li forpelu el ĝi la abomenajn, malbonegajn kontraŭulojn, por la granda gloro de nia nacio. La granda sieĝo komenciĝis je tagigo; la malamikoj malesperante defendis sin; sed nia brava artilerio mortkurage iris antaŭen, per ĝiaj ŝrapneloj kaj granatoj la muroj estis disjetataj; poste per kolerega kaj obstina kuratiko niaj soldatoj okupis la Palacon de la Liraj Poetoj, kiun ili transformis por fortikalo. El ĉi tiu fortikalo niaj soldatoj povis komforte bombadi la en la urbocentro estantan turon, en kiu tiuj abomenindaj malamikoj sin kaŝis. Dum du horoj nia brava artilerio sukcesis tute ruinigi la turon. Kun grandaj perdoj, sed je pliboniga kuraĝo ni atakis la malamikojn kaŝitajn en la Universitato de la Sciencoj, ni disparafadis la tutan domon, kaj ni okupis tridek veturilojn plenajn de karoto, kiun niaj soldatoj tre ŝatas.

Je la sepa horo la tuta urbo kuŝas en ruinoj, kaj la malamikoj kuras venkitaŭ al la limo ...

La stratojn kovras morintoj — sed nia standardo fliras sur bombotrinita tegmento. Generalo Intrepide fariĝas la sekvantan alparolon al la soldatoj:

Ni festenu! La nacio denove pruvis, ke siajn soldatojn nasikas la plej kuraĝaj patriotoj, kaj la ŝtato-

Alvokoj el Hungarujo.

La Fremdulo-Oficejo de Budapest (Idegenfor-galmi, IV, Harisköz 1) volas instigi la urberstaron eldoni E-gvidlibron pri tiu ĉi ne tre konata belega urbergo. Se ĉiu leganto per poŝtkarto petus ĝin, ĝi sukcesos. Tuj skribu kaj skribigu!

La Hungara gazetaro publikigas ĉiajn interesajn novaĵojn pri plej novaj socialaj, kulturaj, sciencaj k. a. okazintaĵoj. Skribu konstante tiajn per poŝtkartoj al Hungara Esperanto Servo en Budapest VI, Hajos-utca 15 II., Páulö Balkányi. Vi tre efike helpos per ĝi Esperanton.

La Hungara Komercia Muzeo tial ne enkondukas E, ĉar ĝi ne ricevis ankoraŭ E-lingvajn leterojn. Ĉiu leganto tuj petu per poŝtkarto informojn pri komerca vivo ktp. de Hungarlando. Grava! (Adreso: Budapest V, Akademiastr. 3.)

Dum la blokado oni ne sendu poŝtaĵojn al Hungarujo; sed oni konservu ilin por posta sendo, aŭ oni sendu al D-ro E. Sós, Del. UEA, Wien, Tuchlauben 18, kun la peio sendi ilin per vojaĝanto al la ricevanto.

Redakcia Respondejo.

A. Mc. Gr. en N.-Y. Dankon por via afabla letero; bedaŭrinde vi ne sufiĉe afrankis ĝin, ni pagis punon de 1,20 M. E. H. en B. Volonte ni akceptas vian kunlaboron. Kompense ni sendos al vi kelkajn ekzemplerojn de ĉiu n-ro, kiu enhavos artikolon de vi.

I. E. en T. Dankon por via propono verki artikolon por la teknika parto de ET, kompreneble ni konsentas.

A. B. D. en M. Certe vi ne bone atentis la abon-kondiĉojn en la spec. n-ro, ĉar la prezo de 9 (15) Mk. por Germanujo estis valoranta nur por 5 monatoj. Sed nun ni konformiĝis al via propono, fiksante la abonprezojn ankaŭ por aliaj landoj laŭ Gmk. Dankon kaj saluton!

I. A. en B. Pro manko de tempo ni ankoraŭ ne respondis viajn proponojn. En la komenco ni ne povas publikigi viajn listojn kaj artikolojn; sed poste, kiam ET eliros semajne, ni certe havos spacon por ili.

M. A. en W. Dankon por la manuskripto. Ni ankoraŭ ne havis tempon por ekzameni ilin. Bonvolu pacienciĝi kelkan tempon.

A. K. en K. Ne estante librokomercojsto kaj posedante nur malgrandan kvanton da duoblaĵ gazetnumeroj, katalogoj ktp., ni bedaŭrinde ne povas plenumi vian peton. Eble la firma Ader & Borel, Dresden-A 1, povos doni al vi utilan materialon.

V. en S. F. Vian leteron ni publikigis. Koran dankon. Ni akceptas plezure vian afablan proponon sendi ĉiunote diversajn artikolojn.

Al la varbintoj de abonantoj al ET ni esprimas per ĉi tio nian specialan dankon.

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

La Esperanto-gazetojn ni petas enpresi sekvantajn anoncon pri nia ĵurnalo kaj sendi al ni interŝanĝe anoncon pri sia gazeto:

Al kelkaj demandintoj. Honorarion por artikoloj ni ne povas pagi. Ni ja deziras, ke ĉiu abonanto estu laŭeble ankaŭ kunlaboranto. Sed ĉiu kunlaboranto ricevas kompenso kelkajn ekzemplerojn de la numeroj, kiuj enhavas artikolojn de li.

Recenzojo. LIBROJ.

KLEINE BEITRÄGE ZU SPRACHENFRAGEN. Ekstrakto el Germanaj artikoloj en la revuo Nova Tempo. Eldonejo Nova Tempo, Wien VI. Prezo 4 Kr. aŭ 1,50 Mk. aŭ 0,50 Fk. La kajero estas tiala propagandilo por E en Germanlingvaj landoj, precipe en Aŭstrio.

LA DORNA KARESILNO, de Bela Manto. 11: 17. 52 p. Ĉeĉbla ĉe Ad. Oberrotman, Warszawa, Krak.-Przedm. 10-15. Prezo 0,40 Kopp. (?)

Jen verketo, kiam oni ne ofte vidas. La libroto enhavas 20 moralemajn fablojn en versoj, kies leria (kvankam tre liberema) farado certigas nin, ke la pesidonimo Bela Manto kaŝas veran bel-amanon kaj poeton. Kiu ne estas kortuŝata, kiam

„La ranoj kvakas kvardekoĉvoĉe:
Ava kavakvĉd akvokavo,
Ve ŝeka estas kaj sen have!
Ho Dia pravol!“

LA GRANDA VIZAĜO EL ŜTONO. Nathaniel Hawthorne. Tradukis el Angla lingvo E. E. Yelland. Brita Esp. Asocio, 17 Hart Str., London WC 1. — 12: 18. 24 p. Prezo 6 P. Stranga, neverŝajna, iom mistika rakonto, kies legado tamen estas edifa kaj agrabila por la nobla tonu kaj bona stilo; sed kial la tradukinto uzis „ĉiame, iome“ anst. „ĉiam, iom“?

LA LIBRO DE KOMLINA PREĜO. Eldonis Eklezia E-Ligo, Farnley Tyas Vicarage, Huddersfield, Angl. Prezo 8 1/2 P. Enhavas la Sanktan Komunion. Kun aldono: La Ordo de Vespera Preĝo. — Krome: Epariŝa Muziko por vulgara kantado, n-ro 5. Antikva Kantado Ebena por la Sankta Komunio. Prezo 5 1/2 Penceo.

MIMI. Rakonto pri la Latina Kvartalo en Paris dum la milito. J. N. Giery. Tradukita el la Angla lingvo de Edw. S. Payson. Eldonis Brita Esp. Asocio, London WC 1. — 12: 18 cm. 55 paĝoj. Prezo 1 Ŝil.

Trageinte ĉi tiu ruĝe broŝurita libretino oni sentas kortuŝon, kvankam la enhavo temas pri verdere ne tre edifa, ne morala aventuro de publikulino [ille de joi] en la „Quartier latin“ de la Franca ĉefurbo. — La tradukito estas grandparte bona laŭ lingva vidpunkto. Preseraroj ne mankas. La malkorektaĵoj estas ofte tre gravaj, ekz. „Junulo“, vagante kun knabino, ekhaltis sub la strataltenoroj por kisi lin.“ [Sendube nur ebrjaj junuloj kisanete ĉirkaŭprenas strataltenorojn!] „Si rigardadis Jacques, ĉar tiu ĉi estis la adiaĵa nokt.“ [Laŭ mia opinio Jacques estas persono kaj ne nokt!] „Li faris karikaturojn de la gastoj, kiujn li vendis po kelkaj centimoj.“ [Estas malprecizite vendi homojn!] „Li portas sian [aldant]an seĝon.“ [Mi nur konas faldeblajn seĝojn.] „Cio ĉi tio kaŭzis strangan penson kuri tra la cerbo de Mimi.“ [Tra mia cerbo kuranta granda demando signoj.] Strangaĵoj estas: „botelo da odelokono“ [Eau de Cologne], „la pentraĵo sidis“ [sidantaj pentraĵoj estas malofajtoj], Alsaco aŭ Elzaso? — Kvankam la tradukinto estas la prezidanto de la Esp. Asocio de Norda Ameriko, mi konsilas al li, ke li elektu por venontaj tradukatoj pli konvenajn tekstojn kaj uzu la servojn de ELA, por ke tiaj lingvaj malkorektaĵoj estu evitataj, kiuj ridigas ĉiun leganton. G. AJUL.

OK NOVELOJ. El: The matador of the Five Towns and other stories, de Arnold Bennett, tradukita de Alfred E. Wackriil. Brita Esp. Asocio, London WC 1. — 12 1/2: 19. 124 paĝoj. Prezo 2 Ŝil.

Tiu ĉi verde broŝurita, sur bona papero bele presita libro de nia bonkonata Angla s-ano enhavas ok plejgrandparte humorplenajn, sprite verkitajn novelojn, kiuj formas tutaĵon, kvankam ĉiu estas sendependa de alia kaj aparte legebla.

La stilo estas entute bona kaj flua, kaj la tradukaĵoj estas leginda. Bedaŭrinde ĝi enhavas akvokavo malkorektaĵojn, sirangaĵojn kaj anglicismojn, kaj tiu tre esperas, ke la tradukinto forigos ilin en venonta eldono.

Tra la tuta libretino svarmas la aĉa vorto „futbalo“. S-ro Wackriil tute ne povos pravigi la uzadon de ĉi tiu vorto, ĉar ĝi estas gramatika eraro, laŭ lingva vidpunkto. „Futo“ signifas mezurilon kaj „balo“ estas danĉesto. Li tion bonc scias uzante „futo“ en ĝia ĝusta senco; krom tio li parolas pri „pilko“. Do, kial li ne uzas „pedpilko“? Ĉu tiu ĉi vorto ofendas lian Anglan oreleon? Kiel ELA-ano mi tute ne povos rekomendi lian verketon, antaŭ ol li estos antaŭtinta la vorton „futbalo“ per „pedpilko“.

Mi longe meditis pri la stranga vorto „rugbiludo“, ĝis kiam mia Angla vortaro montris al mi, ke „rugby game“ estas speco de piedpilkludo. Kial oni ne klarigis la vorton per apudmetita noteto? Ne ĉiu leganto estas sportulo konanta rugbiludon.

Malkorektaĵoj estas krome: „mi figuris al mi“ anst. „mi imagas“, „pasigu al mi mian valizeton“ anst. „donu al mi“, „li finis sian ĝinon“ anst. „li finitinkis“, „si invadis la ĉambrojn“ anst. „si eniris“, „lia patino portis lin al la preĝejo por esti baptita“ anst. „por ke li estu baptata“, „tramo“ anst. „tramveturilo“. [Tramo estas nur rulseco, sed ne veturilo. Ni ne uzu „pars pro toto“ kiel la Latinoj; precipe la Angloj kiinas al tia lingva kripligado. Ne forgesu, ke Esperanto devas nepre eviti tiajn naciismojn!]

Tre malplaĉas, ke la tradukinto esperantigis urbinojn. Kaprice li divenigas al ni nomojn kiel „manĉestra, Skarbro“, Grava pekto. Skribu urbinojn nacilingvaj „Manchester“ anstataŭ „manĉestra“. „Skarbro“ estas sencencioj. Kiu el la legantoj rekonos en ĝi la Anglan urbon Scarborough? — Strange estas, ke la aŭtoro ne konsekvence agas, parte li esperantigas la urbinojn, parte ne; parte li aldonas klarigojn per noteto koncerne la prononcon, parte ne. Pli da zorgemo!

Strangaĵoj estas: roli, ĉiiele, peoco, villo, jangelo, paĝeno.

Progresintaj Esperantistoj havas grandan ĝuon tra legante la spritajn rakontojn, kvankam la tradukaĵo ne estas tute maldela. Kial ekzistas la Esperantista Literatura Asocio, kies servojn ĉiu tradukinto devus uzi? Ni rajtas postuli, ke neniu literatura tradukaĵo estos publikigata, kiu ne estos rekomendata de ELA. G. AJUL.

PITMAN'S COMMERCIAL ESPERANTO. W. M. Page. Eldonis J. Pitman & Sons Ltd., London. EC 4. Prezo 2 1/2 Ŝil.

Praktike aranĝita kaj bele bindita instrulibreto por Anglaj komercistoj, laŭ kurso aperinta en The Esperanto Monthly. Kvin partoj: parol-ekzercoj, traduk-ekzercoj, korespondado, gramatiko kaj praktika vortareto. Entute tre plaĉa verketo. Sed kion diros niaj praktikoj pri la aldonaĵoj tute konfuzaj geografiaj nomoj? Mi trovas

Bordo [Bordeaux], Munheno, Kebeko, Vaŝingtono, Hiereo [Xeres] ktp. Kie ekzistas Baluhlando, Malujo [laŭ la Fundamento: arbo, sur kiu kreskas malto], Sardujo? Mi legas Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Meksikio, Orangio; sed Penzo, Siamo, Tibeto, Tirolo, kaj Aŭstrio, Koreujo, Malajujo, Kvinŝlando, Zealando. Kiam fine ni havos oficialan, unu fojon por ĉiam valorantan geografian nomaron?

RESPONDO DE LA HUNGARA SCIENCA AKADEMIO AL LA ĈEĤA AKADEMIO. Hungara Esperanto Servo, Hejos-utca 15, Budapeŝto. — Prezo 5 Kr.

Defendo kontraŭ la akuzo, ke Hungarujo ekruligis la mond militon.

GAZETOJ.

Ni konfirmas la ricevon de jenaj gazet-numeroj:

a) Esperantaj Gazetoj.

Bulgara Esperantisto, Januaro-Marjo, Esperanta Finnlando, Aprilo, Majo, Junio, Esperantista Laboristo, kun: Le Travailleur Esperantiste, Junio-Julio, Esperantista Voĉo, Januaro-Marjo, Esperanto, Bahía Blanca, Februaro-Marjo, Esperanto, Bern, Majo, Junio, Esperanto Itala Revuo, Februaro, Marjo, Esperanto-Mitteilungen, Graz, Marjo, Junio, Esperanto-Praktiko, Majo-Junio, Germana Esperantisto, Majo-Junio, Laboro, Majo, La Eklezia Revuo, N-ro 10, La Espero, Aprilo, La Progreso, Speciala n-ro pri prez. Masaryk, Le Monde Esperantiste, Marjo-Aprilo, Majo-Junio, L'Esperanto, Marjo-Aprilo, Literaturo, Aprilo-Junio, Nova Tempo, Aprilo-Majo, Svava Espero, Aprilo, Majo, The British Esperantist, Majo, Junio.

b) Aliaj Gazetoj.

Das freie Wort, Lodz, N-ro 1, Esopo, Paris, Decembro 1919, Esperantida, Bern, Marjo, Aprilo, Kózpép Duna, Budapest, N-roj 14, 15, 16, Letras, Cordoba, Majo, Neue Lodzer Zeitung, N-roj 158, 144.

El la enhavo.

En „Esperanta Finnlando“ interesaj artikoloj ilustritaj pri Finnlanda Arkiekturo kaj Finnlanda Industrio. En „Esperanto“ de UEA S-ano Privat (nuna redaktoro de tiu gazeto) raportas pri la venkoj de Esperanto en la Sovjeta Respubliko kaj ĉe la Internacia Federacio de Mililintoj. Propono de Pola S-ano Mergel, elektit Prag'on kiel urbon de l' Universala Kongreso en 1921. Propono de neologismo „varo“ anst. „komercajo“. En „Esperanto Praktiko“ diversaj s-anoj diskutas sur kvar paĝoj pri -ujo kaj -io kaj esprimas la deziron, ke la Akademio sankciu la suilkon -io por landnomoj. „Laboro“ estas nova organo de Portugala Laborista Esp.-Federacio. Adreso: T. da Agua de Flor 33, Lisboa. En „Esperantista Laboristo“ priatinenta artikolo de Iv. H. Krestanoff pri Ida Kunveno.

Svedujo.
Komercaj Komisioj
por E-istoj kaj firmoj estas plenumataj de
W. M. Kjellman, Karra
Uddevalia (Sved.)

Filatelistoj!
Mi estas en rilato kun tre granda firmo de Polaĵ poŝtmarkoj. Belaj kolektoj. Malofajtoj, antikvaj militaj markoj riceveblaj kontraŭ antaŭpago aŭ ŝanĝo de ne uzitaj poŝtmarkoj ĉe
Ad. Oberrotman, Warszawa
Krak-Przedm. 10.

Esperantistoj de l' tuta mondo, kunigu!
Nia informo estas preta ĉiam akurate respondi laŭ viaj deziroj.
Centra Oficejo M. Arlekin, Prez. de E. G. V.
Warszawa (Pol.), Sienna Str. 29/7.

Stampilojn
kaj email-elpendaĵojn ĉiuspacajn kaj por ĉiuj celoj liveras precinde
Stampil-Fabriko Robert Pfennigwerth
Hirschfelde (Saksujo, Germ.)

Importo Eksperto
Bartel & Sertón
— Agentejo kaj Komisionejo —
Graz (Aŭstr.)
Jakominigasse 84
Reprezentado Perado

Centra Librejo „Esperanto“
Bul. Marie Sofia (Bulg.) Bul. Marie Luiza Nr. 46 Luiza Nr. 46
— Ĉiuspacaj oficejoj kaj lernejoj komercaj. —
— Ariaj bildoj, poŝtkartoj, legolibroj. —
Esperantaj ternolibroj, literaturajoj. —
— Abonejo por ĉiuj Esp. kaj ne-Esp. gazetoj. —

S-ro James A. Meagher, 12 Westmoreland Street
Dublin (Irlando)
plezure klarigos la tutaŭ
Irlandan Problemon!
Ĉu vi interesigas pri ĝi?

Tutmonda Foto-Klubo.
Tiu nova E-ista asocio celanta la interrilatojn de ĉiulandaj amator-fotografantoj (korespondado, interŝanĝo) jam havas membrojn dissemitajn sur la kvin partoj de la mondo. — Jara kotizo 3 Fk.
Pro aliĝoj kaj ŝeligoj skribu al la sekretario:
G. Chavand, 105 Boulevard Poniatowski, Paris.

Komerc-Agentejo
de
Dipl.-Ing. P. Tarnow, Kiel (Germ.)
Olshausenstr. 18
prizorgas ĉiajn maŝinojn kaj teknikaĵojn.
Specialaĵoj:
— Foder's ŝpar-kuirplataĵoj —
por ĉiu elektra tensio (110 kaj 220 Voltoj) tuj livereblaj.
Lavtabulaĵo kun zink-lamena enmetajo.
Tre moderaĵoj. — Pogrande speciala rabato.

WINJETOJ!
glu-markoj, gumo-stampiloj,
sigeliloj, div. gravurlaboroj
[plej bona ellaborado] liverataj de
S-ano Rudolf Felsenfeld
Budapest (Hung.) V.
Bályvány-u. 16.

Legindaj novaj libroj:
La vojo al sukceso en la vivo. 3,75 Mk.
Kiel oni povas fondi bonan ekziston? . . . 4,75 Mk.
Fariĝu memstara! 3,75 Mk.
Kiel ni instrulstoj povas plialtigi nian
ensezon? 2,75 Mk.
La sekreta mizero de la instrulstino . . . 1,75 Mk.
kaj aliaj.
Oni postulu detalajn prospektojn (resendkoston) de
Versandhaus „Adelo“, Charlottenburg 2 (Germ.)
Uhlandstrasse 134. — Postŝekco-Konto 31069 Berlino.

Komercistoj, Kolektantoj, atentu!
UNIVERSO (fondita 1910), internacia klubo por plifaciligi la interrilatojn de komercistoj, firmoj, fabrikejoj, kolektantoj kaj korespondantoj, havas konsulojn, delegitojn kaj komercajn agentojn en ĉiuj terpartoj. Propra gazeto.
Jarabono kaj kotizo:
5 Fk., 10 Kr., 1 Dolaro, 1 Guldeno, 1 Ŝil.
Ĉiu aliĝu al Universo kaj postulu detalajn!
Centra Administracio München S. 50. (Germ.)
Dietramszellerstr. 10, II. r.

E-istaj Socialistoj, abonu la gazeton „ESPERANTISTA LABORISTO“
Ok-paĝa gazeto redaktata tute en Esperanto.
Redakcio: E. ADAM, 24 Bd. Beaumarchais, Paris XI.
Administracio: L. GLODEAU, 177 Rue Bagnole, Paris.
Jara abono: Francujo 5 Fk., aliaj landoj 5,50 Fk.

Anoncetoj.
AĈETO. Angla s-ano deziras ricevi de Germana s-ano novan metalan cilindron tipan por skribmaŝino „Mignon“ [Berlin] kun la Esperanto-litero; la literan pladon li jam havas.
Bonvolu indiki la prezon [Markoj] al F. A. Goodlife, Lamley Lodge, Purley, Anglujo.
AĈETO. Mi deziras aĉeti la tri unuajn numerojn de la dumille aperinta „Internacia Bulteno“. — G. PLOUSSU, 6-8 Rue Lafayette, Grenoble, Franc.
AĈETO. La redakcio de ET deziras aĉeti: „Esperanto“ de UEA, Februaro, Junio kaj Novembro 1919.
INTERŜANĜO. S-ro F. Cesarini, Del. UEA, Potenza, Ital., interŝanĝas IPK kun ĉiulandaj gesamideanoj.
INTERŜANĜO. Frant. Baltéck, Cervený Kostelec, Bohem., interŝanĝas IPK kaj nacilingvajn ilustritajn gazetojn kaj revuojn. Nepre li respondas.
INTERŜANĜO. Josef Kávan, Jilemnice 506, Bohem., interŝanĝas nur PM kun ĉiuj landoj. Li nepre respondas.
KORESPONDO. S-ro Johano Bočichov, Vico Cardoso 6, Potenza, Italujo, korespondas L aŭ PK kun ĉiulandaj gesamideanoj.
KORESPONDO. Eksterlandaj s-anoj, kiuj volonte korespondus kun Germano, laŭplaĉe skribu (L, Pl, bñ, PM) al Max Rother, Krefeld, Germanujo, Königstr. 129.
KORESPONDO. Adresarojn de alilandaj geknaboj dezirantaj korespondi petas Klara Tuschinski, Vicel. de UEA, Danzig, Voraŝtdt. Graben 4-8.

Scienco kaj Tekniko.

NOVA KOMPREENO DE LA VIVO KAJ ĜIA PRAKTIKA SIGNIFO POR LA HIGIENO.

(Tiu ĉi artikolo parte jam estis presita en La Teknika Revuo, sed ne ankoraŭ finita. Ni do represas la tutan artikolon de la komenco.)

Penetri la sekretojn de la vivo estas maljunega sopiro de la homo. Tre malsamaj fortoj por tiu ĉi solvenda tasko estas je lia dispo: sentfortoj kaj spiritfortoj; kaj konforme al la evoluo, kiun prenais la vivo de la individuo kaj de la tuto, li servis sin de tiuj ĉi fortoj.

En antikva tempo la sentfortoj sin ŝovas en la antaŭajn partojn; la spiritfortoj estis ankoraŭ malpli evoluintaj, ĉar ne ekzistis ankoraŭ sufiĉanta scienco, por kies kreo ja estas necesa la vivsperto de miljaroj. Tamen la plej alta forto de la homo, la racio, jam instinkte en individuo povis veni al eksterordinara evoluo, kaj tiel ekzistis spiritaj sistemoj, kiujn ni nomas religio, kaj kiuj, konstruitaj sur tre granda delikateso, sed ankoraŭ sur alta racio, alpaŝas al la problemoj pri la sekreto de la vivo.

Tiu ĉi problemoj pri la sekreto de la vivo difalans en du subproblemojn: 1-e pri la scienco de la vivo, kaj 2-e pri la eksto de la vivo, kaj pri la fortoj funkciantaj en ĉiu vivanta korpo.

Ambaŭ problemoj jam de multaj miljaroj okupas la homon kaj dum antikva tempo, krom per la popolerigado, estas responditaj per filozofio, kiun laŭ Schopenhauer oni povas rigardi kiel la religiojn de la kleruloj. En antikva tempo la filozofio posedis tute sendependan pozicion apud la popolarligio. Poste sub la estreco de la Kristana eklezio, kiu volis subigi la tutan spiritan kaj sentan vivon de la homaro, ĉi tiu libero de la filozofio ĉesis, kaj la teologio fariĝis sole reganta reĝino ĉe la mezepokaj universitatoj, sub kiu ĉiu kroma scienco devis sin submeti. Nur per Renesanco kaj Reformacio la spirita vivo denove venis en pli liberajn vojojn, kaj aliaj sciencoj sin trapremis supren, ĝis kiam en la 19-a jarcento ili fine prosperis renversi tute la estrecon de la teologio. Kaj tio estis la merito de la granda klariga laboro de l' 18-a jarcento kaj de la ĉiam pli kreskanta naturscienco.

Hodiaŭ ni provas respondi la demandojn pri la sekreto de la vivo ne sole teologie, sed antaŭ ĉio ankaŭ natursciencie. La naturscienco fariĝis grandega torĉo, lumiganta en ĉiujn sekretojn. La naturscienco serioze ekprilaboris la temon pri la sencoj de la vivo kaj pri ties deveno, same kiel pri la fortoj en ĉiu vivanta korpo funkciantaj, kaj parte metis ĝin sur tute novan bazon.

Tiu-ĉi bazo antaŭ ĉio estas la gvidvorto „evoluo“, unue stampita de Lamarck kaj Darwin, kaj doninte al ni tute malsamajn klarigojn pri la koheroj de la vivo, ol ĝin povis la malnovaj religio kaj filozofio. Ankaŭ la malnova religio akcentis la unuecon de la vivo devenanta el principo, nome el Dio. Ĉe Budhana doktrino pri la metempsiĥozo ni havas en naiva formo la samon, kiun al ni hodiaŭ alportis Darwin en moderna natursciencia maniero, la doktrinon pri la unueco de ĉiuj vivestajoj. Laŭ Budho tiu ĉi aliformiĝo mistike nur post la morto okazas; laŭ Darwin en la granda ĉeno de la besta kaj planta regionoj estas severe laŭleĝa kohero, kaj regula ascendo de la plej simplaj ĝis ĉiam pli altaj formoj kaj fine ĝis la kronaĵo de la kreaĵaro sur nia planedo, ĝis la homo.

Ne povas esti hodiaŭ nun nia tasko disvolvi ĉi tiu la tutan problemon. Mi nur elprenu parton, parolante pri la fortoj en ĉiu vivanta korpo efikantaj.

Ankoraŭ pli precize esprimita, la demando voriĝas: Kiu estas la precipa forto nian korpon moviganta, kaj niajn muskolojn, nian koron, niajn aliajn organojn laboriganta? Kiu ankaŭ svingigas la ĉelomolekulojn kaj kuras de la cerbo kaj spina medolo tra niaj nervuvoj, kaj de la periferiaj nervinigoj returne?

Ni vidos, ke krom tiu ĉi precipa forto ekzistas ankoraŭ aliaj fortoj, kiujn ni nomas „sinergetoj“, ĉar ili kunfunkcias kun la ĉefa forto, kaj sur tiu ĉi kunfunkciado estas fondata la tuta sana organa vivo.

Esenca helpo ĉe tiu ĉi celenda ekono estas la ideo, ke nia korpo estas maŝino, opinio akceptebla nur post kiam la homa tekniko atingis, ke ĝi povas konstrui ne nur simplajn ilojn, sed ankaŭ kunmetitajn, maŝino nomitajn. Maŝino estas aparato, en kiu agas potencialfaloj; instrumento por produkto kaj utiligo de potencialfaloj.

La unua komparo trudita al la homo konforme al historia evoluo, estis la similo de nia korpo al horloĝo-mekanikaĵo. Kiel la horloĝo iras kaj haltas, tiel ankaŭ moviĝas la homa korpo, kaj ĝiaj organoj estas, por tiel diri, la mekanikaĵo, la radoj funkciantaj ĝian vivagon. Ĝi estas ĉiutage streĉata simile al la horloĝo, ricevante novajn fortojn per la nutraĵoj; fine ĝi ekhaltas daŭre kaj jam ne povas esti streĉata. Jen la momento de la morto. Oni povas nun posedi la plej belan horloĝon kun bonegaj radoj kaj ĉiuj kromaj necesaj eroj; se ne enesias bona risorto, ĝi ne iras.

Precize tia estas la homa korpo. Ĝiaj organoj povas esti sanaj, kaj jen tamen malgranda funkciado, kiel oni tion vidas ekzemple ĉe la neŭrasteno. Jen mankas ankaŭ, kiel en la horloĝo, la necesa risorto. Jen mankas elasto ludanta tie ĉi rolon, kiel ni ĝin klare vidas per la malsureco de la koro, stomako, intesto kaj de aliaj organoj*).

Dum la plua evoluo de la tekniko nova komparo trudis sin al la homo, nome kun vapormaŝino. La karboj, la maŝinon hejtantaj, kunrespondas al la nutraĵoj donanta al nia korpo la varmon. Kiel la vapormaŝino, tiel ankaŭ la homa korpo havas sian funkciajn akvon. Mi ne volas plue elspini tie ĉi la komparon, mi volas nur mal-longe diri: pro tiu ĉi komparo oni venas al la ideo, ke la korpo estas terma maŝino. Kaj tiu ĉi ideo estas ankoraŭ hodiaŭ reganta en la oficiala fiziologio sub la influo de l' skolo de Rubner. La oficiala skolo hipotezas, ke la nutraĵoj liveras varmon al la korpo, kaj ke per aliformiĝo ĉiuj fortoj en la korpo estas formataj el varmo, sed ĝi restis ŝuldanta la pruvon pri tio. La klasika eksperimento de Rubner ĉe la ripozanta besto montris ja, ke la leĝo pri konservado de la forto ankaŭ valoras por la homa korpo, kaj ke ĉe la ripozanta besto la tuta energio, akceptita per la albumin-, gras- kaj karbonhidrat-enhavo de la nutraĵoj, reaperas kiel varmo. Sed ripozanta besto certe havas ankaŭ neniajn plujajn fortekspezojn. La iometo uzata dum la ripoza stato por cirkulo kaj glanda funkciado devas esti kalkulata egala al nulo. Laŭ tio la eksperimento de Rubner neniel pravas, ke la varmo en la korpo povas esti ŝantaĝita en aliajn funkciajn fortojn.

La ideo pri terma maŝino do ne estas per si mem kapabla klarigi la funkciadon de la korpo. Jen, la plua evoluo de la tekniko devas helpi nin. Kaj ĉi foje la elektro helpe prezentas sin kaj trudas al ni la komparon de nia korpo kun maŝino elektra.

La homa korpo estas akumulatoro. Ĝi akceptas fortojn kaj lasas ilin ree liberaj. La tuta nervsistemo, se rigardate laŭ ĝia ekstero, havas eksterordinaran similon al telegrafa aŭ telefona sistemo. Oni forsendas ĉe la subhaŭta fino de la nervo sciigon, ekzemple per tuŝo al haŭtloketeto. Tiu ĉi sciigo ira la subhaŭta sentuma nervo venas al medolo kaj cerbo, kaj povas plue progresi de la centroj kaj transiĝi en motorajn nervojn, kiel ekzemple ni vidas ĝin ĉe la refleksaj.

(Daŭrigota.)

D-ro W. WINSCH.

* Vidu mian nur Germane aperintan broŝuron: „La arto plilongigi la vivon“, p. 8-11, kie mi detaligis tion.

Eklezio.

DEK JAROJ IKUE.

La komenco de la Esperantista movado inter katolikoj kuniĝas kun la komenco de Esperanto mem. Inter la unuaj adeptoj ankaŭ troviĝis nemalmultaj katolikoj, kelkaj pastroj kaj Episkopa Moŝto Zerr el Saratov. Kaj kiam Esperanto transpaŝis la landlimojn de l' Rusa imperio kaj precipe enradikiĝis unue en Francujo, tiam la energio kaj talentplena paroĥestro en Sainte-Radegonde apud Tours, Emilio PELTIER, estis unu el la unuaj, kiuj komprenis la utilecon de Esperanto por la Sankta Katolika Eklezio. Eldoninte alvokojn li en decembro 1912 elirigis unuafoje la malgrandan kvarpaĝan verdan folieton en Esp. „ESPERO KATOLIKA“ kiel aldonon al Franca revuo „L'Aube“. La unua numero de tiu-ĉi unua katolika Esperanto-organo enhavas jam la regularon de la Societo „Espero Katolika“. Kuragiĝite de la ĉefepiskopo de Tours, kiu „tre volante aprobas la projekton“ kiel rimedon por la vastigado de l' Evangelio kaj por la interproksimiĝo de l' popoloj, pastro Peltier senlace plue laboris, kaj jam post unu jaro li povis eldoni „Espero Katolika“ sendepende de „L'Aube“, kaj en marto 1905 la organo jam aperis 52-paĝa en oktavo. Kunlaborantojn ĝi ja havis sufiĉe multajn, sed nur tro malmulte da ŝonantoj. La kaŭzoj estis jenaj: Unue multaj kleraj katolikoj konantaj lingvon Latinan uzatan en la tuta Katolika Eklezio ne sentis la bezonon de alia lingvo internacia; plue multaj konsideris Esperanton iom suspekteme kiel ne katolikan eltrovaĵon, kaj fine, al kelkaj la kvinpinta verda stelo, la insigno de l' Esperantistoj, ŝajnis esti framasona insigno, malgraŭ la Eklezio ankaŭ uzas la saman stelon; malgraŭ D-ro Zamenhof, la eltrovinto de la lingvo, estis ortodoksa hebreo kaj per la kvin pintoj nur volis aludi pri la kvin terpartoj ĉirkaŭprenataj per Esperanto kiel per lingva ligilo.

Al ĉiuj-ĉi antaŭjuĝoj estis metita fino per la APOSTOLA BENO, kiun Lia Papo Moŝto Pio X-a donis al la pastro Peltier kaj al la redaktoroj de „Espero Katolika“ la 27-an de junio 1906, esprimante samtempe sian Papan plaĉon. Tium Papan Benon la modesta pastro ne eĉ unu momenton konsideris kiel kuragiĝon al li persone donitan, sed kiel supernaturan helpon, kiel altan aprobon de sia penado kaj de la celo de „Espero Katolika“: Utiigi Esperanton por la dissemado de la Vero Katolika kaj por la frata unuiĝo de ĉiuj homoj.

En 1905, okaze de l' Unua Internacia Esperanto-Kongreso en Boulogne-sur-mer estis legata por la katolikaj partoprenintoj sankta meso, dum kiu la unuan fojon estis kantata himno en Esperanto, komenciganta per la vortoj:

„El ĉiuj landoj kaj el ĉiuj gentoj
Ni kunvenintaj vin adoras, Dn.“

D-ro Zamenhof mem ĉeestis tiun unuan Esperantan Meson.

En la Dua Universala Esperanto-Kongreso pastro Peltier atingis la permeson de la tiea katolika episkopo prediki unuafoje en Esperanto. La prediko postlasis ne-priskribeman impreson al la ĉeestintaro. Mondpentekosto estis reveninta! Al la prediko sekvis ree la himno: „El ĉiuj landoj.“

La kongresanoj katolikaj disiris tre fortikigitaj spirite, kaj ĉiu el ili fariĝis pioniro de la katolika Esperanto-movado. Baldaŭ ĝi ekfloris ĉie. Modele agadis en Belgujo la grupo „Excelsior“, tradukante en Esperanto diversajn katolikajn verkojn; en Irlando la pastro kaj fervora Esperantisto Parker; en Francujo S-ro Cl. Colas, kiu precipe sukcese propagandis Esperanton inter katolikaj grupoj de junuloj; plue en Anglujo, Aŭstrujo, Germanujo, Hungarujo, Italujo, Nederlando, Palestino kaj Rusujo vico de altmeritaj viroj.

Jen grava perdo trafis la junan socion: simile kiel Moŝto la neforgesebla pastro Peltier nur povis rigardi de malproksime la Promestian Landon: antaŭ ol realigi sian koreziron, la Unuan Internacian Katolikan Esperanto-Kongreson, li mortis la 17-an de Februaro 1909, ne hejme, sed laŭ sia pia deziro en Lourdes, ĉe la Sanktega Virgino.

La Esperantistoj memoras pri pastro Peltier kiel la plej sindona al ili, la katolikoj memoras pri tiu, kiu estis ilia plej sincera amiko. La nomo de Peltier okupas ĉiam la plej honoran lokon en la historio de la katolika Esperanto-movado.

Fine dum Pentekosto 1910 okazis la Unua Esperanto-Kongreso Katolika de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I. K. U. E.), kiel nun estis nomata la antaŭa Espero Katolika, en Paris. Lia Papa Moŝto Pius X-a, kiu estis legitimita Prelatan Moŝton Prof. Giambene kiel oficialan reprezentanton de la I. K. U. E. ĉe la Vatikano, respondigis la sindonan telegramon de la kongreso en Esp. Post Paris tiam sekvis en 1911 Hago, en 1912 Budapeŝto, en 1915 Roma. La pilgrimaj-partoprenintoj de ĉi-tiu lasta kongreso salutis la Sanktan Patron per Esperanto-himno kaj estis akceptataj en solena aŭdienco.

La „Espero Katolika“, la organo mem, konservis ĉi-tiun malnovan nomon, estis legata en 17 landoj; I. K. U. E. havis 20000 membrojn.

Jen komenciĝis la milito!
(Finota.)

M. MIELERT (Breslao),

Prezidanto de la Germana Ligo de Katolikaj Esperantistoj.

LA VI-a KONGRESO de IKUE okazos en Hago la 15-an kaj 16-an de Aŭgusto, tuj post la XII-a Universala Esp.-Kongreso, kaj katolikaj kunvenoj okazos same en Hago de la 9-a ĝis la 15-a de Aŭgusto.

Informojn oni povas peti de la sekretario de l' organiza komitato, S-ro P. J. Zenigraaf, de Riemerstraat 54, Hago (Nederlando).

Muziko.

(Interesaj sciligoj pri muziko, recenzotaj muzik-eldonitaĵoj ktp. estas sendotaj al S-ro KURT HAEFEKER, studento, Frankfurterstr. 45, Siegburg, Germ.)

La Internacia Kongreso de muzikistoj okazos fine de Septembro en Bruselles.

La limtempo de la konkurso por la kreado de Svisa nacia himno estas plilongigita ĝis la 30-a de Septembro 1920. Alsendaĵojn oni petas al „Zentralpräsident des Eidgenössischen Sängervereins, Stadtpräsident Porchat en Neuenburg“.

Thomas Beechan, la direktoro de la Covent-Garden-Teatro, malfermis la printempo-sezonojn de la granda Angla opero. La repertuaro konsideros precipe Wagner'in operojn, inter ili la „Meistersinger“, kiuj ne estas aŭditaj en Londono deponi dek jaroj, je dua loko sekvas Mozart. En Berlin mortis Dr. Karl Stork, re fama kaj ŝatata muzikverkisto de la Germana gazeto „Türmer“.

Afranku
sufiĉe!

Al

Esperanto Triumfonta

Eldonanto: Teo Jung

Horrem Bez. Köln

Cologne, Germ.

Parolejo.

(Je libera dispono de ĉiu abonanto.)

La specimena n-ro de ET enhavis Parolojn pri jenaj temoj:

1. La Opinio de la Eldonanto.
2. Koncentrigo.
3. Internacia Esperanto-Servo por la Gazetaro.

LETERO DE D-RO CORRET.

(Rilatas al Parolo 1.)

Estimata Samideano!

Kian malbelan vorton vi skribis! . . . „La tro granda fanatikeco de kelkaj samideanoj“.

Ĉu do vi kredas, ke estas fanatikeco la firme decidita volo „nenion ŝanĝi“ en la Fundamento?

Fanatikeco estas la blinda fervoro, la entuziasmo kaj sentimentala kredo, ja senrezona „tio estu, ĉar la Sankta Profeto ĝin diris!“

Ĉu vere vi kredas, ke tia estas la animstato de la sen-sanceblaj Fundamentistoj?

Kia komputinda eraro!

La decido „nenion ŝanĝi“ en la Fundamento estas kontraŭe rezultato de tute malvarm-sanga observado de faktori kaj matura pripensado de iliaj konsekvencoj. Tia observado kaj pripensado plej klare montris la sole eblan vojon al la celo, kaj „ne flankigante“, ni iras la vojon celitan“. Nur nekomprenantoj povas nomi tion „fanatikeco“.

Vi ŝus permesas, pri via „gazeto“, ke „kiom da kapoj, tiom da opinioj“. Des pli vere pri lingvaj demandoj! Kaj jam staras nepre ekster dubo la fakto, ke neniu unueco estas efektivebla sur la fundamento de lingvaj diskutoj pri „la plej bona, definitiva formo“.

Nur komuna akcepto de unu skribita dokumento — la Fundamento, — povas certigi unuecon, dank' al disciplina ofero de ĉiuj personaj preferoj kaj preferoj.

Ŝajne, ne tia estas via opinio, ĉar vi revas pri kongreso, en kiu oni decidus la definitivan (!) formon de la lingvo, kaj vi volas „permesi“ la uzadon de la kontraŭ-Fundamenta sufikso -io. Vi mem eĉ permesis ĝin en via gazeto (Svisio pg. 3, kol. 4; Svedio pg. 4, kol. 4).

Kvankam vi diras, ke tiu opinio estas via pure persona kaj ne estas tendenco de via gazeto, tamen la publiko juĝas multe pli simple. Por ĝi, ĉiu gazeto havas la opinionon de ĝia redaktoro. (Ĉu vere la publiko tre eraras? Vi opinias, ke oni devas permesi la uzadon de -io, kaj oni ja vidas en via gazeto: Svisio, Svedio.) Kaj ankaŭ por la publiko, ĉiu kunlaboranto samopinias, kiel la gazeto.

Tial mi nun tre bedaŭras, ke mia nomo aperis sur paĝoj, kie oni ankaŭ legas: Svisio, Svedio, — kie oni volas „permesi“ kontraŭ-Fundamentulojn, — kaj kie oni eĉ deziras kongreson por aranĝi „definitivan formon“ de la lingvo.

Por forigi ĉian dubon, mi do kredas pli bone, prokrasti de nun la dirigon de mia kunlaborado (mi ne ankoraŭ diras „ĉesigi“), almenaŭ ĝis mi povos pli klare konstati, kia estos la sintenado de via gazeto.

Eble vi pensos: Jen estas ĝuste tiu „tro granda fanatikeco“, pri kiu mi parolis. . . . Ne, kara Sinjoro, ne fanatikeco, sed nur profunde pripensita disciplino por unueco, necesega unueco por fina venko.

D-RO PIERRE CORRET.

P. S. — Vi diras, ke „la ĉefa kulpo je ĝia malkonkordo (pri -io, -ujo) la estas atribuita al niaj mallaboremaj institucioj“.

Mi kredas, ke ankoraŭ tie ĉi vi eraras: jam en 1909 la Akademio voĉdonis pri -io. Rektoro Boirac demandis: „Ĉu vi akceptas, ke la Akademio konsilu la provan uzadon de la sekvantaj neologismoj: . . . 6-e La sufikso -i por landnomoj?“ Kaj el la 12 Akademianoj, nur unu respondis „jes“, sendube nur ĝia proponinto mem, kiu tiam estis Akademiano kaj poste fariĝis lidisto!

Komprenable, mi volonte akceptas kaj eĉ deziras, ke vi enpresu mian leteron en via „Parolejo“. Tiel la legantoj komprenos, kiel ne tuj venas mia dua artikolo, kaj povos aprobi aŭ malaprobi mian sintenadon.

5.

PRI LETERO DE D-RO CORRET.

(Rilatas al 4.)

Tre estimata eldonanto! Jam vi sidas en la urtikoj! Vi parolis pri „fanatikeco“, vi permesis -io. Ĝis nun mi estis opinianta, ke Parolejo estas loko, kie oni povas esprimi sian opinion tute libere kaj senpene. Eraro!

Ni havas gravan internacian gazeton, „Esperanto“ de UEA, kaj nun aperas dua, kiu celas fariĝi universala kaj ofia.

La unua uzas, ne rigardante emon aŭ fanatikecon, nur -io. (Laŭ mia opinio tre malbelsona, ĉar Esperanto certe akcentas ĝian sufiĉe da „i“.) Sed ĉar la ĉefalero estas, ke -io jam ekzistas („Aŭstrujo“, kiu jam de komenco ne akceptis „Aŭstrujo“), ke -ujo estas tro ampleksa („piprujo“), ke la Akademio kaj Lingva Komitato silentas, ke ĉiu ĝin komprenas, kaj fine, ke la enhavo estas tio, kio interesas, mi klare eldiras, ke oni batalas por bagatelado.

Mi estas certa, kaj ĉiu samideano konsentas, ke la malutilo rezultanta el uzado de -io estas malgravega, kontraŭe la malutilo de neaparantaj artikoloj instruigaj estas gravega.

Ĉiu besteto havas sian plezuron, ĉiu homo sian konvinkon (eĉ kelkajn) kaj ĉiu Esperantisto sian propran Esperantidomon. Lasu ilin, sed permesu, ke ni parolu en via parolejo, kiel al ni kreskis la beko. Ankaŭ „ioano“ povas esti „ĝisostulo“.

BABEOR.

Eltondu, kompletigu, forsendu! Forstreknu, kio ne taŭgas!

Abonilo.

Mi abonas al Esperanto Triumfonta kaj petas alsendon de po . . . ekzempleroj de la

Specimena N-ro, N-roj: . . .

. . . entute . . . ekzempleroj.

La pagon de . . .

(indiku kiom da Resp.-Kup., Fk., Sil., Hfl. ktp.)

mi sendas samtempe per . . .

Por subten-abono mi aldonas . . .

Nomo (legeble) . . .

Profesio . . .

Adreso (precize) . . .

6.

RESPONDO AL D-RO CORRET.

(Rilatas al 4 kaj 5.)

Tre ŝatata S-ro D-ro!

Post la respondo de mia kunlaboranto Babeor mi permesas al mi ankoraŭ kelkajn vortojn.

Mi certe bedaŭras, ke vi sentas vin ofendita de mia malgranda vorto „fanatikeco“; kaj ankoraŭ pli mi bedaŭras, ke la kelkfoja ideo de l' ankoraŭ pli malgranda vorteto -io kaŭzis al vi fian antipation kontraŭ mia ĵurnalo, ke vi eĉ minacas eventuale ĉesigi vian kunlaboradon.

Kiel oni vidas en via kazo, estas nur tiu malbenata sufikseto -io, kiu estigas plej grandan malkonkordon inter la s-anaro. Pro tiu ĉi bagatelo ekestis akra batalo, kaj tiu batalo fariĝas de tago al tago pli akra, pli fanatika. Nia Majstro konsilis al ni en sia granda saĝeco, ke antaŭ ĉio ni gardu la konkordon. Mi estas certa, ke la Majstro, se li ankoraŭ vivus, vidante, ke niaj tri plej gravaj (por la praktikilo) gazetoj, nome „Esperanto“ de UEA, „Internacia Komerca Revuo“ kaj „Esperanta Finnlando“, nia plej sukcesplena organizacio, UEA, kaj la plimulto de ĝiaj membroj konsekvence uzas la sufikson -io kaj pravigas ĝin per sufiĉe konsiderindaj argumentoj, — mi kredas, ke li jam ne malpermesus ĝian uzadon aŭ ke li tuj voĉdonigus la Akademion pri akcepto aŭ malakcepto de la sufikso, por fini tiun tute nenecesan disputadon. Cetere ni enkondukis kaj ankoraŭ enkondukas multajn aliajn neologismojn, pri kiuj neniu ekscitigas kaj kiuj tamen estas grandparte nebezona; ŝajne la tuta hodiaŭa konservativiteco en Esperanto koncentriĝis kontraŭ la sola sufikseto -io.

Vi skribas, ke jam en 1909 la Akademio voĉdonis pri -io. Legu la Hodlerajn artikolojn! Kion do kredi? Sed se efektive la Akademio en 1909 jam voĉdonis pri -io, ĉu ĝi ne povas voĉdoni denove — nun, kiam la demando preskaŭ disigis la s-anojn en du interbatalantajn partiojn: por-kaj kontraŭ-ioanoj?

Tamen, por konformiĝi al via deziro, mi presos en la hodiaŭa kaj en la sekvantaj n-roj konsekvence -ioj, ĝis la Akademio estos voĉdoninta denove, kaj mi presus -io nur tiukaze, se io ioano en io sia artikolo aŭ anonco postulas la presigon de -io; sed mi kredas, ke neniu ioano estas tia „ĝisostulo“. Do oni povas supozi, ke la sufikso -io ne plu aperos en ET, kaj oni rajtas atendi, ke vi nun daŭrigos vian certe ŝatindan kaj tre ŝategatan kunlaboradon.

7.

LA PROBLEMO DE LA LANDNOMA FINAĜO.

En preskaŭ ĉiuj niaj gazetoj nun estas preparolata ĉi tiu nepre solvota problemo. La disputo estas unufanke pri la oficiala sufikso „ui“ kaj la finvorto „lando“, aliflanke pri la nova, ne-oficiala sufikso „i“.

„ui“ malplacas ĉefe por sia trisenceno („lando“, „arbo“ kaj „objekto, kiu enhavas“) kaj pro tio, ke ĝi ne ĉe ĉiuj landoj estas aplikibla (ekz. Luksemburg-ujo, Nederland-ujo), „land“, ĉar ĝi estas tro longa.

Sed ankaŭ la proponata kaj jam — maljuste — uzata „internacia“ sufikso „i“ havas mankojn tro malmulte faktajn. Linue, ĉi tiu akcentata „i“ ne estas internacia (Angle: Germany, Italy, Bulgaria, Virginia; Germane: Italien, Bulgarien, Spanien; Latine: Germania, Hispania, Italia ktp. ktp.), sed ĉiokaze Franca (l'Italie, la Russie ktp.); due, la akcento estas forsovata de la ĉefa (radika) silabo; trie, la sufikso pilongigus ĉiujn nomojn je unu silabo (Luksemburgio, Nederlandio ktp., — aŭ ĉu eble ĉi tiuj landoj ree estu esceptoj?) kaj kvare, ni jam havas sufiĉe da „ioj“ en Esperanto. La dua kaj kvara punktoj estas precipe malgrateblaj en cifradaj de landnomoj.

Ĉiujn ĉi mankojn, kiujn plejparte posedis ankaŭ „ui“, malhavas sufikso, kiun jam antaŭ ĵaj proponis S-ro Prof. Christaller — vidu ĵian verketon „Propraj nomoj en Esperanto“ — nome „i“. Linue, ĉar ne-akcentata, ĝi estas pli internacia ol „i“ (Germanio, Italio, Rusio); due, la akcento restas sur la ĉefa (radika) silabo; trie, la nomoj, ne ricevante novan silabon, ne trolongiĝas (Finnlando, Luksemburgio, Nederlandio); kvare, Esperanto ne estas malbeligata (vidu supre). En vortoj kiel e. Aŭstrujo kaj Flandrio oni alparolu la „i“ kiel ne-akcentatan „i“. Kromaj malfacilaĵoj ne ekzistas.

La proponita sufikso „i“ havas ankoraŭ tiun oportunon, ke ĝi ne multe malproksimiĝas de la malnova „ui“; ĝi povas esti rigardata kiel simpla mallongigo de „ui“. Kaj ankaŭ de „i“ ĝi ne estas malproksima, ĉar ĝi ne estas la du disputataj finaĵoj facile povus unuigi per „i“.

Sed antaŭ ĉio mi akcentas: Ĝis definitiva decido de kompetenta aŭtoritato, ni ĉiuj restu ĉe la Fundamenta „ui“ aŭ „land“!

LEONO FUNKEN.

8.

LA LINGVA KOMITATO.

En sia n-ro de Mario-Aprilo „Germana Esperantisto“ publikigis Germanlingve tre gravan artikolon de iu S-ro R. L., en kiu estas proponate elekti en ĉiuj landoj nacian lingvo-komitatojn, kiuj unufanke akceptu la dezirojn de la Esperantistoj en sia lando kaj pledu por ili ĉe la Internacia LK, kaj kiuj aliflanke subtenu laŭeble la internacian LK en siaj lingvaj laboroj. La Internacia LK estu elektota per la naciaj LK, kaj ĝia nombro estu malpliigota, por ke ĝi fariĝu vivpova, efektive gvidanta organizaco.

Opinianta tiun proponon tre grava kaj pridiskutinda, mi priretakis ĝin koresponde kun diverslandaj samideanoj, eĉ LK-anoj. Ĉiuj konsentas, ke la nuna organizado de la LK estas multe tro peza por atingi kontentigan rezultojn; ankaŭ ĝia konsisto estas ne justa laŭ nacieca vidpunkto.

Estus konsilinde, ke la propono farita de R. L. estu preparolata en la Haag'a kongreso; ĉar, kiel ĝis nun, ni ne povas daŭri.

T. J.

Kongresanoj! Estas urĝa tempo por havigi al vi vian pasporton, kiun vi bezonas por iri al la

12-a Kongreso en Hago!

L'Esperanto

Internacia Monata Revuo

sub patronado de „Itala Katedro de Esperanto“

— Eliras en S. Vito al Tagliamento (Ital.) —

Literatura kaj Koresponda Fako

Lingvaj Lecionoj per Esperanto

Enigmaĵoj — Konkursoj.

Jarabono Italaĵn Fk. (Lirojn) 5.

Plena Kurso de Itala Lingvo por Esp-istoj

Italaĵn Fk. (Lirojn) 6,50.

Pensiono „Erika“

Luksaj loĝejoj, tre malkaraj por eksterlandanoj [ĉar Germ. valuto]

Baltika Marbanejo Warnemünde

Strandweg 12 a. — Wilh. Scheel, Del. de UEA.

Telefono 147.

La Hungara Komerca Revuo

Meza Danubo

prove aperigas Esperantan tekston kaj en ĉiu n-ro la liston de ĉefaj Hungaraj firmoj laŭ branĉoj Esperantlingve. Ĝi estas direkte por eksterlando! Ĉiu tia n-ro estas bona propagandilo! Oni abonigu ĝin per komercistoj kaj fabrikistoj (ĉar 10 Fk. 36 n-roj, unu n-ro = Resp.-Kup.). Skribu al la redakcio:

KÖZÉP DUNA, V. Zólián u. 10, BUDAPEST.

Kiu interesiĝas pri

Hungarlando

senpage ricevas ĉiulingvajn broŝurojn pri lando, popolo, historio, nuna situacio ktp. de

Teritoria Ligo Hungara, Budapest IV (Hung.) Váci utca, IV, Piaristák Tévél.

Kontraŭ kolekto de 30 malsamaj poŝtmarkoj de ekster-Eŭropaj landoj (ne Lisnoj) mi sendas saman nombron Bulg. poŝtmarkoj; kontraŭ 40 poŝtmarkoj — 5 belajn vidaj-kartojn de Bulgarujo. La kolekto konsistu el kompletaj aŭ duonserioj de poŝtmarkoj. Oni sendu per rekomendita letero al:

Panajot At. Kolev, Sofia (Bulg.)

str. Regentska 19.

Ĉiulandaj komercistoj k. industriistoj vizitu la 3-an Internacian Foiiron de Frankfurt a. M.

IMPORTO 3—9. Oktobro 1920 EKSPORTO

Prospektoj en 9 lingvoj kaj en Esperanto. — Korespondado en Esperanto.

Oni petu tuj informojn de

MESSAMT (Esperanto-fako) FRANKFURT a. M., Germ.

Festhalle.